

# LA ONDO de Esperanto

*Internacia sendependa magazino en Esperanto*

Intervjuo kun Grigorij  
Arosev

Petra kaj Anneleen  
kontribuas al la  
Amerika movado

La unua agnosko de la  
Esperanta Civito

Wolfgang Kirschstein:  
“Murdo de hundo”

Antaŭ 100 jaroj:  
Zamenhofa omaĝo al  
Johann Martin Schleyer

Kozjma Prutkov en la  
“Rusa Antologio”

Reinhard Haupenthal:  
La eldon-aventuro de  
“Stafeto”



2011

7

# LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2011. №7 (201)

**Aperas** ĉiumonate

**Fondita** en 1909 de Aleksandr Saĥarov

**Refondita** en 1991

**Eldonas kaj administras** Halina Gorecka

**Redaktas** Aleksander Korĵenkov

**Konstantaj kunlaborantoj** Peter Baláž, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, ALEN KRIS, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Andrej Peĉonkin, Sergio Pokrovskij, Serge Sire, Andrzej Sochacki

**Adreso** RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

**Telefono** (4012) 656033

**Elektronika poŝto** [sezonoj@kanet.ru](mailto:sezonoj@kanet.ru)

**Hejmpaĝo** <http://Esperanto.Org/Ondo>

**Abontarifo por 2011**

*Internacia tarifo:* 38 eŭroj

*Orienteŭropa tarifo:* 20 eŭroj

*Ruslanda tarifo:* 590 rubloj

*Pollanda tarifo:* 60 zlotoj

*Aerpoŝta aldon:* 5 eŭroj

*Elektronika abono (pdf):* 12 eŭroj por ĉiuj landoj

**Perantoj** vidu la liston sur la 23a paĝo de la februara *Ondo*.

**Konto ĉe UEA** avko-u

**Recenzoj** Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

**Eldonkvanto** 550 ekzempleroj

**Anonctarifo**

*Plena paĝo:* 100 EUR (3000 rubloj)

*Duona paĝo:* 60 EUR (1800 rubloj)

*Kvarona paĝo:* 35 EUR (1000 rubloj)

*Okona paĝo:* 20 EUR (600 rubloj)

*Malpligrandaj:* 0,50 EUR aŭ 15 rubloj por 1 cm<sup>2</sup>

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripetito.

**Donacoj** La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto "avko-u" ĉe UEA.

**Represoj** Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2011.

"La Ondo de Esperanto" (Волна эсперанто). 2011, №7 (201).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горещкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 19 июня 2011 г.

Цена свободная. Тираж: 550 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

## Redakcie

Jackie Huberdeau el Francio, Inga Johanson el Svedio kaj multaj aliaj legantoj de *La Ondo* demandas: kiel Halina fartas en Moskvo?

Post la transloĝiĝo al Moskvo en la komenco de februaro, Halina estas flegata en la fako de peritonea dializado en la 52a Moskva hospitalo, kies fakestro kaj kuracistoj estas ne nur kompetentaj, sed ankaŭ tre bonvolemaj. Halina estas kontenta pri la nivelo de la flegado, oni faras necesajn esplorojn, kiuj ebligas observi la adekvatecon de la dializado.

Ekde januaro ŝi regule vizitas ankaŭ tutlandan centron de hiperparatireozo, farante la necesajn esplorojn kaj ricevante rekomendojn por kuracado. Dum naŭ semajnoj danke al sponsora helpo de la kompanio *Amgent*, kiu senpage disponigis modernan efikan medikamenton al dudeko da malsanuloj en diversaj regionoj de Ruslando, Halina efektivigis kuracadon de hiperparatireozo, kiu jam tre malbone efikis al ŝia ostaro, kion atestas speciala esploro de la denseco de la ostaro.

Oni ne povas diri eĉ proksimume, kiam okazos la operacio. Ĉi-jare du el ŝiaj konatoj-samsortuloj estis operaciitaj. Ambaŭ sukcese. Unu el ili devis atendi en Moskvo pli ol du jarojn, sed la alia estis pli bonŝanca, ĉar la greftado okazis nur post kelkaj monatoj da atendado. Intertempe, ĉiumonate estas renovigata esplorado pri ŝia sango por aktualigi la datumojn por ren-atendado. En la proksima monato ŝi devos fari plurajn medicinajn esplorojn por kontroli la staton de la organismo.

Medicinaj zorgoj postulas certan tempon, sed Halina daŭrigas siajn laborojn kiel administranto kaj provleganto en *La Ondo de Esperanto* kaj *Sezonoj*. Komence de junio estis farita nia unua Moskva sonprogramo. Krome, Halina aktive partoprenas en la tutlanda socia organizaĵo de ren-malsanuloj *Nephro-liga*. Halina kontribuis tekste al la TV programo *Telemost* pri hiperparatireozo, kunorganizis konferencon pri la rajtoj de pacientoj, en kiu partoprenis pli ol 60 reprezentantoj de 24 Ruslandaj regionoj. Ŝi pretigas leterojn al la sanprotekta ministerio, partoprenas en la socia konsilio ĉe la Moskva kontrola institucio pri sanprotekto, kaj spertiĝas en seminarioj por sociaj organizaĵoj. Tre emocia estis por ŝi ĉeesto dum la socia agado kaj futbala maĉo *Homoj por homoj*, okazintaj la 29an de majo en la Moskva stadiono *Lujniki* subtene al greftado de organoj.

Tre grava evento en nia vivo estas la fino de la universitataj studoj de nia filo Aleksej, kiu la 16an de junio ricevis perfektan noton pro sia diploma verko. Ekde la komenco de la jaro estas li, kiu ĉiumonate vizitas Pollandon por tie ricevi, pagi, enkovertigi kaj dissendi la revuon. Li ankaŭ plenumas libromendojn. En majo li ricevis duonjaran prokraston de la deviga armea servo, kaj almenaŭ ĝis novembro la presado kaj ekspedado de la revuo estos en bona ordo.

Danke al la internacia subteno kaj kuraĝigo, kiujn ni ricevas, la atendado en Moskvo pasas pli trankvil-etose ol ĉe plimulto da aliaj ren-handikapitoj. Dankon al ĉiuj pro la zorgado kaj pro la subteno!

AIKo

**La kovropaĝa foto** ilustras la vortojn de la prezidanto de REU pri la kreskanta rolo de la reto en la nuna mondo, kaj ankaŭ en la landa asocio. Ne timu komputilon! (*PressFoto*)

# Ĉu Esperanto povas doni ion principe novan al la mondo?

Grigorij Arosev, 31-jara Moskva literaturisto, laboranta en la Ruslanda televidkanalo *Kulturo*, antaŭ unu jaro iĝis prezidanto de la Rusia Esperantista Unio (la plej juna prezidanto de REU ekde ties fondo en la nuna formo en la “unuĝa kongreso” en 1994). Okaze de la kompletigo de lia unujara prezidanteco ni petis lin respondi kelkajn demandojn.

**Via pasintjara kandidatiĝo estis surpriza. Kio motivis vin al tio?**

Unue — dankon pro la propono respondi la demandojn kaj tiel konigi al internacia legantaro iujn pensojn kaj opiniojn, kiujn mi havas. Kio pri la kandidatiĝo, mi ja dekomence komprenis, ke ĝi estos surpriza por multaj, ĉar mi dum longa tempo neniel aktivis en la “movado” (la kaŭzojn de neaktivado mi ne menciis, sed ili estis nur privataj, do neniel ligitaj al la movado mem). En iu tago mi konsciis, ke mi multe pensas pri la Esperanto-vivo en nia lando, sekve de kio aperis kelkaj ideoj, kies realigo donus laŭ mi signifan utilon al la movado. Kaj la realigado de tiuj ideoj estas multe pli facila, se realiganto okupas iun landskalan Esperanto-postenon, interalie, ĉar la aferoj postulas financadon — vere malgrandan, sed tamenan. Certe mi povus ankaŭ labori en aliaj postenoj, kaj mi akceptus, se ekprezidus iu alia kaj proponus al mi vicprezidi aŭ estrariniĝi, sed mi “ĉirkaŭrigardis” kaj komprenis, ke tiumomente ne estis seriozaj kandidatoj por la prezida posteno, do mi decidis provi prezidantiĝi — kaj sukcesis. Cetere, mi nepre volas menci, ke la konsento vicprezidantiĝi de mia ekskonkurinto Svetlana Smetanina, malgajninta la prezidan baloton, estas ege aprezinda el ĉiuj vidpunktoj, des pli, ke iu alia bombaste kaj elmontre malakceptis mian proponon kunlabori kadre de la estraro, sed temas ne pri eksprezidanto Ĉertilov.

**Antaŭ tiu decido vi probable (re)legis la statuton de la prezidota asocio kaj vidis, ke ĝi havas du celojn; la unua estas popularigo kaj disvastigo de Esperanto, kaj la dua “plifirmigo de la paco, evoluigo de la internacia kunlaboro en ĉiuj sferoj de la homa agado helpe de la lingvo Esperanto”. Kiel REU realigas siajn celojn?**

La menciitaj celoj estas neevitebla deklarendajo, sed samtempe ili estas tute teoriaj kaj havantaj malmultan ligon al la realeco. Oni povas diri, ke ĉiu esperantisto, kiam ion skribas aŭ diras

en Esperanto, iom popularigas Esperanton en sia medio. Tiuokaze jes, REU ĉiel faras tion. Sed reale ni strebas al multe pli lokaj celoj, kredeble same kiel multaj aliaj landaj Esperanto-asocioj (escepte de plej grandaj kaj plej fortaj): eldoni niajn bultenon kaj jarlibron, labori pri kelkaj novaj projektoj, respondi regule venantajn leterojn k. a.

**Se temas pri la celoj kaj defioj, mi memorigas, ke okaze de la proklamo kiel la Esperantisto de la Jaro 2005, Povilas Jegorovas, skribis, interalie, ke “REU ne plenumas la rolon de la tutlanda asocio. Ĝi mem estas kvazaŭ Esperanto-klubo <...> Ĝi ne havas seriozajn kaj gravajn defiojn <...> ne elkreskis el la nivelo de la tendaroj kaj kantoj”. Ĉu li pravis?**

Mi legis lian opinion komplete kaj, bedaŭrante, agnoskas lian plejpartan pravecon. Nia lando estas tro granda por esti unueca. Oni povas estimi aŭ malstimi apartajn individuojn, kiuj iam gvidis REU, sed, troviĝante kelkmil kilometrojn for de Moskvo, kie loĝas preskaŭ ĉiuj eksprezidantoj, ankaŭ mi mem, estas tre malfacile akcepti gvidan rolon de la Unio. Homoj agas (se agas!) memstare, kaj apenaŭ ion bezonas de la landa asocio. Certe neniu rifuzus monon, sed REU neniam estis sufiĉe riĉa por sponsori lokan agadon (kvankam iom subteni, jes). Kun granda atento mi legus konkretan konsilon de la estimata Povilas — kiel en la nunaj kondiĉoj REU povas superkreski la nivelon de tendaraj kantoj ktp.

**Mi vidas, ke en la laborplano de REU por via mandato mankas mencio pri tendaroj, kiuj, laŭ unu el viaj antaŭuloj “funkciis kiel emocia drogo <...> io, kio donas al la homo eksterordinaran aŭ almenaŭ eksterrutinan plezuron <...> eskapo el teda kaj griza ĉiutageco al Esperantujo — amata lando”. Ĉu tiu nemencio estas signo de elkresko el la tendara nivelo?**

Tendaroj kaj aliaj amasaj renkontiĝoj estis kerno de la movado en la



Foto de Nataĵa Saljaeva

1990-aj jaroj kaj pli frue. Kion donis la tendaroj al ties partoprenantoj? Ripozon, plezuron kaj — ĉefe — interkomunikadon. Oni renkontiĝis kun malnovaj amikoj, akiris novajn, kaj praktikis la lingvon. Nun estas principe alia tempo. Ne parolante pri laŭvorta ripozo (por tio nun ekzistas multegaj aliaj variantoj, inter kiuj Esperanto-tendaroj okupas vere malaltan lokon), por la komunikado ekzistas interreto. Havante deziron, oni povas ĉiutage interkomunikiĝi en Esperanto, kaj ne nur skribe, sed ankaŭ parole — dank’ al Skajpo kaj similaj programoj. Mi absolute certas, ke nun ja interreto estas kerno de la movado, kaj ĉiaflanka evoluigo de diversaj retaj servoj (ne nur porkomunikaj!) estu tasko de REU. Kaj ĝuste tial laŭ mi “tendaroj” ne devas esti centro de nia atento. Des pli, ke tiujn ĉiam organizas regionaj aktivuloj — inter kiuj jes povas esti REU-funkciuloj, sed kiuj agas kiel lokanoj, ne kiel REU-representantoj.

**Vi planis amasan pridemandadon kaj diskuton pri okazigo de UK en Ruslando. Ĉu, post la fiasko de la klopodado de kelkaj antaŭaj estraroj, nun estas sufiĉe da entuziasmo, laborfortoj kaj subteno por tiu ideo?**

Ne estas. Mi ne partoprenis la preparlaborojn por la Moskva UK, sed mi scias, ke estis farita grandega laboro. Neniu el la motoroj de la kongresinvitado fariĝis pli juna kaj pli energi plena, kaj neniu volas ripeti la laboron kun denove ne garantiata rezulto, kaj mi tion bone komprenas. Samtempe mi tute ne vidas aliajn homojn, kiuj volus tion fari (ĉi-okaze “voli” kaj “kapabli” estas tute malsamaj aferoj). Ĉion ĉi mi lernis nelonge post la prezidantiĝo, tial la pridemandado estis planita, sed ĝi ne estos

realigita — mi anticipe scias ĝian rezulton. Demando: “Ĉu vi volas, ke UK okazu en Rusio?” Respondoj: “Jes” 90-100%. Demando: “Ĉu vi pretas kunorganizi ĝin?” Respondoj: “Ne” 100%.

**En la laborplano de REU apud rutinaĵoj estas kelkaj ret-projektoj: retejo E-kluboj.ru, ret-arkivo de REGo, REU-kluboj en sociaj retejoj, subteno al la reta versio de la vortaroj de Boris Kondratjev. Kio okazas ĉi-terene?**

Sociaj retoj estas uzataj por diskonigi novaĵojn de REU, kaj tion ni pli-malpli faras. La retan version de la vortaroj de Kondratjev ni daŭre subtenas (vidu [www.eoru.ru](http://www.eoru.ru)), kaj planas ankaŭ partopreni eldonadon de papera versio. La ideo de [E-kluboj.ru](http://E-kluboj.ru), laŭ mi, estas tre interesa — kadre de unu retejo havi informojn pri ĉiuj landaj Esperanto-kluboj kaj kolektivoj, samtempe donante al ili eblecon memstare aktualigi informojn pri sia agado, kion (aktualigon) senprobleme permesas la vikia teknologio. Tio eĉ ne estas rekte ligita kun REU — la Unio iniciatis, sed la retejo estas destinita por ĉiuj. Sed bedaŭrinde mi renkontis preskaŭ planan indiferentecon pri la afero flanke de lokaj kluboj. Mi ne intencas lasi la projekton kaj supezeble okupiĝos pri ĝi, ankaŭ kiam mi eksprezidantiĝos, ĉar mi firme opinias ĝin tre bezonata. Se dum plia jaro E-kluboj.ru ne aktivigis, nu, verŝajne ni ĉesigos, ĉar vane elspezi monon, eĉ se malgrandan, oni ne devas.

Samtempe mi volas emfazi, ke esperantistoj en Rusio ĝenerale estas nesufiĉe aktivaj. Ili pretas pagi siajn kotizojn, sed malmulte aktivas — malmulton volas, malmulton bezonas kaj eĉ

malmulte diskutas (estas delonge notita, ke retbabiladojn partoprenas ĉiam la sama deko da homoj). Mi, certe, ne parolas pri kelkaj individuoj, kiuj ja motor(ig)as la movadon — redaktoroj, gvidantoj de retejoj kaj kelkaj kluboj, sed pri la baza esperantistaro, por kiu la aktivuloj laboras. Sed tio estas tute alia kaj sufiĉe ampleksa temo, pri kiu mi intencas skribi apartan artikolon por iu periodaĵo.

**Por firmigi la pacon kaj evoluigi internacian kunlaboron per Esperanto oni devas kunlabori kun alilandaj Esperanto-asocioj kaj instancoj. Kio okazas ĉi-kampe? Ekzemple, ĉu REU sekvas la sperton de la Germana Esperanto-Asocio, kiu kongresis kune kun la landaj asocioj de Ĉeĥio, Francio kaj (plej laste) Nederlando?**

Mi kontaktis kelkajn aktivulojn el aliaj landoj kaj ĉerpis bonajn ideojn pri kelkaj projektoj kaj iniciatoj. Sed la ideo pri kunaj kongresoj, ve, estas preskaŭ malreala pro vizaj kaj distancaj problemoj. Similaj aranĝoj okazas por faciligi la organizadon kaj partoprenon, sed nia-okaze rezultus tute male. La sola eventuala varianto estas Ukrainio (ĉar Belorusio havas nek movadon, nek landan asocion), sed pri kiu urbo povas temi — mi nun ne imagas: Ĥarkov? Lugansk? Rostov-na-Donu? Krome mi ne certas, ke la ne ĉiam klare aganta estraro de UkrEA konsentos dividi kun REU sian kongreson.

**Kelkaj gvidaj aktivuloj de REU havas nekutimajn konceptojn pri la nuna kaj estonta rolo de Esperanto en Ruslando kaj en la mondo. Kion vi opinias pri tiu rolo kaj pri la loko de la landa asocio en tio?**

Nuntempe oni ne plu bezonas veni al tendaroj por interkomunikiĝi kaj praktiki la lingvon. Per interreto oni povas fari tion internacie sen forlasi sian hejmon. (*PressFoto*)



Laŭ mi, Esperanto nun senrevene perdas sian rolon, kiun ĝi havis antaŭ kelkaj jardekoj. Ĝi ne plu estas “fenestro” al internacia komunikado, ne plu estas sola rimedo ion havi/ricevi. La moderna mondo proponas plurajn alternativojn por inform-serĉado, interkomunikado, vojaĝoj, konatiĝoj. Mi multe ŝatas la movadon kaj la homojn en ĝi, sed faktoj konfirmas, ke por havi tion, kion donas Esperanto (escepte de pure lingva aspekto), oni tute ne devas lerni novan lingvon kaj mergiĝi en novan kulturon.

La amplekso de la intervjuo ne permesas longe argumenti, sed mi certas pri tio. Do la nuntempa tasko de ĉiuj “konsciaj” esperantistoj estas kompreni, ĉu Esperanto povas doni ion principe novan al la novepoka mondo krom, mi ripetu, nur la lingvo mem? Mi, certe, ne havas pretan respondon, sed mi pretas kundiskuti. Nia lando estas kaj estos integra parto de la procedo.

**Ĉar jam temas pri via privata opinio, mi demandas vin pri la rolo de Esperanto en via privata vivo, en via laboro kaj en via arta kreado.**

Mi fariĝis esperantisto estante eĉ ne 13-jara, do mi kreskis kun (apud, en) la movado. Ĝi donis al mi kaj ion pozitivan (konatiĝojn, vojaĝojn), kaj ion negativan, kiuj sume fariĝis signifega parto de mia vivosperto.

Mia laboro neniel estas ligita kun Esperanto. Tamen la verkado en Esperanto estas daŭre interesa afero, sed, malgraŭ miaj modestaj iamaj sukcesoj en la Esperanta literaturo kaj, lastatempe, en la ruslingva, mi nun tute ne sentas motivon plu verki en Esperanto. Tion kaŭzas ne maldeziro, sed malbezonateco. En nia lando oni publikigas kaj eldonas nur unu aŭtoron, kaj tio ne estas lia kulpo — li verkas laŭ siaj fortoj kaj talento. Evidentas, ke redaktorojn kaj eldonistojn ne interesas aliaj nomoj.

Strange: esperantisto Ivan Naumov ĵus eniris la “mallongan liston” de unu el la prestiĝaj literaturaj premioj, liaj verkoj regule aperas en diversaj periodaĵoj, eldoniĝis lia ruslingva libro, sed lia talento estas plene ignorata flanke de Esperanto-redaktoroj. Pli-malpli same pri mi. Verki ion seriozan en Esperanto kaj poste *peti* tion eldoni aŭ publikigi? Dankon, ne. Prefere mi verku ruslingve, ĉar mi delonge scias pri interesiĝo flanke de kelkaj ruslingvaj periodaĵoj, kaj planas aperi ankaŭ en aliaj.

**Kio estas via slogano?**

Ĉion sukcesas tiu, kiu rapidas nenien.

## Stano Marček plu redaktos

Pasintjare la Estraro de UEA daŭrigis la kontrakton kun Stano Marček pri redaktado de la revuo *Esperanto* ĝis la julia-aŭgusta numero 2011. La celo estis, ke ekde la septembra numero la nuna redaktoro daŭrigu sian laboron sub nova kontrakto. La Estraro tamen ĵus decidis daŭrigi la validecon de la nuna kontrakto, farita en 2003, ĝis la fino de la jarkolekto 2011.

La Estraro antaŭvidas proponi novan kontrakton al Marček post la Universala Kongreso en Kopenhago, kie oni verŝajne akceptos novan dokumenton pri la gvidlinioj pri la redaktado de la oficiala organo de la Asocio. Ĝia definitivigo dependas de la difino de la ĝenerala komunika politiko de UEA, pri kiu nun diskutas la Komisiono pri Strategiaj Demandoj. La komisiono estis elektita pasintjare en Havano kaj laboras sub la gvido de Mark Fettes. En ĝi aperis interalie la ideo, ke la revuo havu plurajn volontulajn redaktorojn pri diversaj sektoroj de la movado sub la kunordigo de la ĉefa redaktoro.

Ĉar mankas ankoraŭ klareco pri tiu kaj aliaj aspektoj de la redaktado, la Estraro decidis, ke la nuna redaktoro laboros laŭ la malnovaj kondiĉoj ĝis la lasta numero de la jarkolekto 2011.

GK UEA

## Hanojo 2012: la datoj fiksataj

La Kongresa Fakto de UEA fiksas la datojn de la 97a Universala Kongreso de Esperanto en Hanojo. La 97a UK disvolviĝos tie de la 28a de julio ĝis la 4a de aŭgusto 2012.

La definitivigo de la datoj dependis de la elekto de kongresejoj, kiu povis okazi post la laborvizito de la Konstanta Kongresa Sekretario (KKS) Clay Magalhães al Hanojo fine de aprilo. La ĉefa parto de la kongresa programo okazos en la hotelo *Meliá*. La ejo de la inaŭguro kaj aliaj programeroj, en kiuj samtempe partoprenos la tuta kongresanaro, estos la Palaco de Kulturo.

La preparlaboroj progresas glate kaj kun entuziasmo, konstatis Clay Magalhães. Li konatiĝis kun eblaj kongresejoj kaj kun loĝigaj eblecoj, partoprenis en kunsido de LKK kaj pasigis multan tempon por konsili ĝiajn membrojn pri organizaj detaloj. KKS vizitis ankaŭ la infanĝardenon, kie okazos la 43a Internacia Infana Kongreseto kaj kies direktorino estas aktiva esperantisto.

GK UEA



Stano Marček

## UEA kunlaboras kun ISO

La partopreno de UEA en la agado de la Internacia Organizaĵo por Normigado (ISO) rimarkinde plivigliĝis dank' al la nova komisiito Mélanie Maradan, kiu energie eklaboris tuj post sia nomumo en aprilo ĉi-jare.

Jam ekde 1991 UEA havas oficialajn rilatojn kun la Teknika Komitato pri terminologio k.a. lingvaj kaj enhavaj datumoj de ISO. 6 jun 2011 UEA membriĝis ankaŭ en ĝia 2a subkomitato pri terminografiaj kaj leksikografiaj labormetodoj. Ĝi okupiĝas pri la praktikaj aplikoj de teorioj, principoj kaj metodoj por terminologia laboro. Ĝiaj ĉeftemoj estas interalie terminografio, leksikografio, tradukado, interpretado kaj la internaciaj lingvokodoj, ekzemple, la dulitera kodo "eo" kaj la trilitera "epo" por Esperanto.

Ekde nun UEA oficiale rilatas al la subkomitato en kategorio A, t. e. kiel organizaĵo, kiu aktive partoprenas la laboron de la subkomitato. Reprezentanto de UEA rajtas libere vidi kaj komenti la projektojn de la subkomitato kaj nomumi spertulojn por partopreno en ties laborgrupoj kaj laborrenkontiĝoj.

Pri la membriĝo de UEA povis voĉdoni ĉiuj 26 naciaj normigaj institutoj, kiuj partoprenas en la subkomitato. Voĉdonis 18, ĉiuj por la akcepto de UEA: Belgio, Ĉinio, Danio, Francio, Germanio, Hispanio, Irlando, Japanio, Kanado, Kolombio, Nederlando, Korea DPR, Korea Resp., Norvegio, Ruslando, Svedio, Sud-Afriko kaj Ukrainio. Neniu voĉdonis kontraŭ, dum 8 institutoj ne partoprenis en la voĉdonado (Aŭstrio, Britio, Finnlando, Kroatio, Irano, Meksiko, Pollando kaj Usono).

GK UEA

## Edukado.net daŭre kreskas

Edukado.net — porinstruista paĝaro [www.edukado.net](http://www.edukado.net), kreita kaj daŭre subtenata de Esperantic Studies Foundation (ESF) — informis, ke 9 jun 2011, ĝi denove ekhavis 2000 registritajn membrojn: "Mi skribas *denove*, ĉar tiun nombron ni atingis jam antaŭ pli ol unu jaro, sed pro la ĉi-janua purigado kaj forigo de la delonge neuzitaj kontoj ni perdis ĉ. 500 membrojn. Nun ni denove estas dumilope, kio en si mem estas bela kvanto. Bravo al ni ĉiuj", — skribis la redaktoro de la retejo, Katalin Kováts.

La retejo estis plene rekonstruita fine de la pasinta jaro, riĉiĝinte, interalie, per novaj iloj, mapoj kaj kolektoj (ekzemple, de diplomlaboraĵoj pri esperantologio aŭ interlingvistiko). Tiu rekonstruo okazis dank' al la subteno de la uzantoj.

Alia novaĵo estas, ke Edukado.net antaŭnelonge lanĉis RITE-n (Retan Instruistan Trejnadon ĉe Edukado.net). La kurson kreis, financis kaj estros d-rino Katalin Kováts, kaj en la projekto kunlaboras la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), Akademio Literatura de Esperanto (ALE) kaj instruistoj de la Esperantologia Fakto de Universitato Adam Mickiewicz en Poznań, Pollando. Al la kurso jam aliĝis kaj ekstudis 15 personoj el Belgio, Francio, Greklando, Aŭstralio, Nov-Kaledonio, Usono, Vjetnamio, Svislando, Portugalio kaj Britio.

RITE celas ebligi akiron de fakaj konoj kaj praktiko pri instruado de Esperanto, kompletigataj de kulturaj kaj gramatikaj konoj. La ĉefa celgrupo estas klubgvidantoj, instruantoj aŭ instruemuloj, kiuj ne havas eblon partopreni ĉeestan trejnadon aŭ volas profundigi siajn sciojn kaj akiri novajn spertojn.

Studi en RITE ĉiu povas laŭ siaj ritmo kaj ebloj, en ajna tempo de la jaro. La antaŭvidita studtempo, kun kelkaj studhoroj ĉiusemajne, estas proksimume unu jaro. La kondiĉoj por partopreni en la studoj estas minimume lingvonivelo B2 pri Esperanto, aliro al la reto kaj pago de la laŭlande difinita partoprenkotizo. Baldaŭ ekfunkcios interna stipendifonduso, kaj eblas peti subtenon ankaŭ ĉe ILEI. Cetere, la prelegoj de la studbloko Liberaj Studoj iom post iom estos spekteblaj ankaŭ al la nekursanoj, do ne hezitu konatiĝi kun la retejo eĉ se vi ne planas oficiale studi.

Pli da informoj: [edukado.net/rite](http://edukado.net/rite).

ESF

## Memorinda Kroatia kongreso

Kroataj esperantistoj okazigis sian 9an kongreson 14–15 maj 2011 en Bjelovar, omaĝe al la 100-jariĝo de la unua libroforma kroata literaturaĵo en Esperanto: *La trezoro de l' orafisto* de August Ŝenoa. Ĝin tradukis kaj en 1911 eldonis Fran Kolar-Krom, la fondinto de la unua Esperanto-societo en Bjelovar.

Partoprenis preskaŭ 200 kongresanoj el Kroatio kaj el 9 aliaj landoj. La kongreson subtenis la urbestro Antun Koruŝec kaj la departamentestro Miroslav Čačija. La urbestro mem malfermis la kongreson kaj la ekspozicion “Esperanto en Kroatio” en la urba muzeo.

La kongreson anticipis Esperanto-kurso de Josip Pleadin, ekspozicio “Esperanto — literatura lingvo” en la Popola biblioteko Petar Preradović kaj distribuo de kvin mil reklamiloj pri Esperanto en ĉiuj mezlernejoj de Bjelovar.

La oficiala kongresa programo okazis en la urba Kulturdomo. Post la malfermo pri Eŭrop-unia temo parolis Zlatko Tišljarić, la sekretario de EEU. La prezidantoj de Kroata Esperanto-Ligo (Judita Rey Hudeček) kaj Hungaria Esperanto-Asocio (Imre Szabó) subskribis interkonsenton pri partnera kunlaboro inter la du landaj asocioj.

La kultura parto de la programo estis riĉa kun kantoj, dancoj, deklamado, teatraĵoj, kaj muziko. Estis prezentitaj tri novaj Esperanto-libroj.

Post la programo okazis komuna vizitado de la ekspozicio *Esperanto en Kroatio*, komuna fotado kaj komuna tagmanĝo kun dancmuziko ĝis vesperaj horoj en la restoracio *Golub*. Oni metis florkronon sur la tombon de Vilim Polasek, veterana Bjelovara esperantisto.

La duan kongresan tagon okazis ekskurso al Daruvar kaj Veliki Grđevac, kiu finiĝis per mallonga folkloro programo en la centro *Kukavica*.

Pri la kongreso raportis pluraj retejoj, gazetoj kaj televido. Estis eldonita speciala filatela koverto, 14 maj funkciis speciala kongresa stampo en la poŝtoficejo de Bjelovar.

**Davor Grgat**

## Himalaja Renkontiĝo

Okazis la 9a Himalaja Renkontiĝo de 26 feb ĝis 8 mar 2011. Inter la 65 partoprenantoj estis 16 el Francio, 9 el Japanio, 2 el Svedio, 2 el Mongolio, kaj 1 el Danlando; ĉiuj aliaj estis nepalanoj.

La landa asocio NEspA bonvenigis la gastojn en la hotelo *Marsangdi* en Thamel.

Post du tagoj, dediĉitaj al ekskursoj en Katmandua valo, komenciĝis tritaga piedvagado. Oni ekmarŝis de Sundarijal kaj fine venis al Namobuddha tra Chisapani, Nagarkot kaj Dhulikhel.

4 mar la tuta grupo veturis al Lumbini, la naskiĝloko de la Buddho. Dum du tagoj oni povis rigardi la vidindaĵojn de la granda sankta tereno. 7 mar okazis prelegoj en Lumbini. Michel Dechy prelegis pri Tinĉjo en Tibeto. Peter Wraae kaj s-ino Altang (Mongolio) prelegis pri siaj landoj. Hori Yasuo klarigis konkurson, kiun li kreis por kutimigi esperantistojn al legado.

La saman tagon la grupo realvenis al Katmanduo, kie 8 mar okazis Internacia Vespero en la hotelo *Manaslu* — la lasta programero de la Internacia Himalaja Renkontiĝo, kiu jam rolas kiel grava Esperanto-evento.

**Bharat Kumar Ghimire**

## Fervojistoj kongresis en Ĉeĥio

Jam la 63a kongreso en la seninterrompa vico de la jaro 1949 okazis 7–14 maj 2011 en la nordbohemia regiona urbo Liberec sub la tegmento de Kongresa centro *Babylon*.

Tie kunvenis 173 esperantistoj-fervojistoj el 18 landoj. La solena malfermo okazis en la granda kongresa salono. Post prezento de la infana popoldancgrupo *Jizerka* komenciĝis salutparoloj de honoraj gastoj: mgr. Jan Čermák, direktoro de fako de Ĉeĥaj fervojoj kaj prezidanto de Landa Asocio de FISAIC; Guy Gieres, ĝenerala prezidanto de FISAIC; kaj Libuše Hýblová en la nomo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj kiel komitatano de UEA. Sekvis salutoj de reprezentantoj de landaj asocioj de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF). La kongreson oficiale malfermis per sia festparolo prezidantino de IFEFF Rodica Todor.

Dum pluaj tagoj la estraro de IFEFF traktis internajn aferojn, fakuloj partoprenis kunsidojn de la Terminara Sekcio kaj de la Faka komisiono, kie ili diskutis novajn fakajn terminojn kaj konatiĝis kun aktualaĵoj el la fervoja medio en diversaj landoj. En la ĉefa prelego estis prezentita sekureca kaj komunikada tekniko por fervojo de du enlandaj firmaoj — AŽD Praha s.r.o. kaj Starmon s.r.o.

En la amuza parto de la kongreso sin prezentis la miksitaj koruso *Bendl* el Česká Třebová kaj diversaj orkestroj de Fundamenta artlernejo el Liberec. Kun aplaŭdo estis akceptita ankaŭ la internacia balo kun riĉa tombolo kaj prezentado de JoMo el Francio.

Unu tago estis dediĉita al tuttagaj ekskursoj al Praha kaj la nordbohemiaj kasteloj Sychrov kaj Hrubý Rohozec. La partoprenantoj revenis de ĉi tie plenaj da interesaj travivaĵoj.

Post fermo de la kongreso grupo de la partoprenantoj havis kvartagan postkongreson. Dum la postkongreso ili vizitis famajn kastelojn en Meza Bohemio — Karlštejn, Křivoklát kaj Konopiště, estis akceptitaj per vicdirektoro de fervoja ekspozicio en Lužná u Rakovníka. Interesa estis ankaŭ trarigardo de la plej famaj lokoj en Prago, inkluzive de pitoreskaj restoracioj.

La 64an IFEFF-kongreson venontjare akceptos la Esperanto-urbo Herzberg-am-Harz en Germanio.

**Ladislav Kovář**

**Sur la foto:** kelkaj kongresanoj en fervojistaj uniformoj de siaj landoj



## Kongreso en la ora nordo

En Stokholmo okazis 13–15 maj la Sveda Esperanto-Kongreso kun 67 partoprenantoj el sep landoj. En la kongreso prezentiĝis nova libro de Katalin Kováts *Stelsemantoj en la ora nordo*. La libro kaj la prelego de Kováts temis pri la rumana esperantisto Tiberio Morariu (1901–1987) kiu longe vivis kaj laboris en Svedio kaj disvastigis Esperanton. Ankaŭ Dorica, filino de Morariu, ĉeestis la kongreson kaj la prelegon de Kováts.

La lingvisto Mikael Parkvall el la universitato de Stokholmo prelegis svedlingve pri sia studo *Kiom eŭropa estas Esperanto?*, en kiu li komparis la strukturojn de multaj eŭropaj lingvoj kun Esperanto. Wim Posthuma montris filmon pri sia vizito en Togolando. Dum la vespermanĝo sabatvespere, Nataša kaj Andreo Bertse kantis kaj ludis muzikon.

Sveda Esperanto-Federacio elektis novan prezidanton Roland Lindblom, post Bengt Olof Åradsson, kiu nun estos anstataŭanto. La jarkunveno unuanime akceptis prilaboritan statuton. Krome okazis kunvenoj de Esperanto-Domo, Eldona Societo Esperanto, sveda sekcio de KELI, kaj ILEI-se.

**Olof Pettersson, Ulla Luin**

## Ne nur lernado dum SES 2011

Ĉu vi daŭre planas vian Esperanto-someron? Tiukaze pripensu partopreni en SES 2011 — Somera Esperanto Studado, kiu okazos 30 jul — 7 aŭg 2011. Jam la kvara fizika *lernu!*-renkontiĝo okazos en la urbo Nitra, Slovakio (90 km de Bratislavo, 160 km de Vieno, 155 km de Budapeŝto).

Kio atendas vin?

- Ok agrablaj tagoj en la Esperanto-medio
  - Kvin niveloj de instruado, internacie spertaj instruistoj
  - Seminario *Flugiloj de malfacila vento*, organizita de ILEI
  - Prelegoj, prezentoj, diskutoj
  - Manlaboroj, kreivaj metiejoj, sportumado
  - Ekskursoj al interesaj lokoj
  - Diskotekoj, nacia kaj internacia vesperoj
  - Koncertoj (*La Perdita Generacio*, *Asorti*, Johannes Mueller, Juliano)
- Jam 155 homoj el 30 landoj aliĝis al SES ĉi-jare — ĉu vi estos la sekva?
- Aliĝilo kaj detalaj informoj troveblas rete ĉe [www.lernu.net/ses](http://www.lernu.net/ses)

**Peter Baláž**  
SES-organizanto



Stokholmo: la nova prezidanto de SEF Roland Lindblom, Katalin Kováts kaj Mikael Parkvall. (Fotis Olof Pettersson)

## Kantoo: la jubilea kongreso

11–12 jun okazis la 60a Esperanto-Kongreso en la regiono Kantoo en la universitato Saitama. Kantoo estas la regiono, en kiu estas Tokio kaj la ĉirkaŭaj ses gubernioj. La unua kongreso okazis en 1952 en la Esperanto-Domo de Japana Esperanto-Instituto, kaj poste sen interrompo okazadas la kongreso, kaj fine la numero atingis 60.

Antaŭ la kongreso oni timis, ke la partoprenantoj estos malmultaj, ĉar Japanio estis plena de funebra etoso, sed fine aliĝis 126 homoj.

En la unua tago ni okazigis ĝeneralan kunsidon de la Ligo, en kiu estis raportitaj agadoj kaj proponita agadplano kaj la nova estraro; ambaŭ raportoj kaj proponoj estis aprobitaj.

Vespere ni havis bankedon en la najbara japanstila restoracio kun, interalie, vjetnama fraŭlino Nguyen Thi Phuong. Ni kantis, ĝuis kvizon, ludadon de japana muzikilo kaj plastabotelo (tiu homo, mi, povas ludi per plasta botelo!) kaj kompreneble manĝis kaj drinkis multe.

En la dua tago jene okazis diversaj kunsidoj, ekzemple, pri kantado, Taj-ĉiĉuan, Hietor-terapio, medicino kaj scienco, porpaca agado kaj aliaj.

Post la tagmanĝo gajigis la etoson koncerteto de vjetnamaj muzikiloj, kaj poste okazis prelego de Nguyen Thi Phuong, la motoro de la vjetnama junulara movado. Ni invitis ŝin por marki la 60an jubileon kaj la okazigon de la 97a UK en Hanojo. Ŝi parolis pri Hanojo, Vjetnama Esperanto-movado kaj junulara movado, montrante bildojn per komputilo. Ŝia prelego instigis multajn vojaĝi al Hanojo en la venonta jaro.

En la fermo s-ino Fan el Ĉinio deklamis sian poemon pri sia amo al Esperanto, kaj poste korusanoj kantis la kanton *Saluton!* de Konisi Gaku, kaj laste ĉiuj kantis kune *La Esperon* kaj *La Tagiĝon*.

**Hori Jasuo**

## Du similaj ideoj

Pri aplikado de Esperanto en la skolta movado kaj pri la popularigo de skoltismo inter esperantistoj diskutis partoprenantoj de la trejnseminario, kiu okazis 24–30 maj en Varsovio. Dum kvin tagoj 25 homoj el 15 landoj efike kunlaboris malgraŭ tio, ke ili komence tute ne konis unu la alian.

La seminarion kunorganizis Skolta Esperanto-Ligo (SEL) kaj TEJO dank' al la subvencio de Eŭropa Junulara Fonduso de Konsilio de Eŭropo. La seminario okazis en la ĉefa sidejo de Pollanda Skolta Asocio (ZHP).

Oni prezentis la agadon de ambaŭ organizoj, landan kaj internacian agadon en skoltismo kaj en la Esperanto-movado, kaj ankaŭ skizis la planon de interorganiza kunlaboro dum la proksima jaro. Multe da tempo oni dediĉis por pripenso kaj prilabori organizadon de la internacia geskolta ĵamboreo kun Esperanto kiel la laborlingvo. Pri tiu ideo oni diskutis ankaŭ kun la Internacia Komisiito de ZHP Rafał Bednarczyk. Forte ligita kun Esperanto estis ankaŭ la urba ludo, kiun por la partoprenantoj preparis membroj de la dua organizo — Skolta Asocio de Pola Respubliko (ZHR).

Okazon por popularigi Esperanton la gastoj havis dum la surstrata Scienca Pikniko, kie deĵoris anoj de Pola Esperanto-Asocio. La seminarianoj el Venezuelo, Meksikio, Ukrainio, Irlando kaj aliaj landoj allogis varsoviajn al la tendo de PEA kaj interesigis ilin pri la internacia lingvo.

La trejnseminario estis parto de la reaktiviga kampanjo, entreprenita de SEL por popularigi Esperanton inter skoltoj kaj la skoltan movadon inter esperantistoj.

**Kinga Nemere-Czachowska**

**Sur la foto:** Esperantistaj skoltoj el Hungario kaj Belgio en la Varsovia urba ludo.





Petra Smidéliusz prezentas Esperanton ĉe la Babelturo (Fotis Silvia Rottenberg)

## Petra en la Babelturo

La titolon “Monda Ĉefurbo de Libro 2011” ricevis de Unesko la Argentina ĉefurbo. Tial ĝia jam kutime vigla kultura vivo des pli brilas nun per aldonaj eventoj. Unu el ili aparte allogas vizitantojn: libra Babelturo.

Ĝin kreis la ekscentra skulptistino Marta Minujín, kiu iam inventis “rompendajn skulptaĵojn” kaj rekonstruis en Nov-Jorko hamburgeran Liberec-statuon. Ĉi-okaze ŝi decidis restarigi la Babelturon ... per libroj.

Temas pri 30 mil titoloj el plej diversaj lingvoj. Ili kovras gigantan strukturon metalan ĉirkaŭ spirala ŝtuparo. Irante supren kaj suben en la instalaĵo, la vizitanto rigardas al miloj da libroj, kiuj pendas en travideblaj plastaj sakoj, kaj ripete aŭdas la vorton “libro” diverslingve, diversvoĉe.

La librojn la artistino ricevis el ĉiuj landoj de la mondo tra iliaj ambasadoj. Esperantujo ne bezonis ambasadejon: Argentina E-Ligo transdonis, pere de sia prezidantino Silvia Rottenberg, librojn

en la Internacia Lingvo. Ŝi enmanigis al la artistino ekzempleron de la pasintjare aperinta *Esperanto Una cura para las heridas de Babel?* (Esperanto, ĉu kuraco por la babelaj vundoj?) de Andrés Battig kaj Roberto Sartor. Poste ŝi ripetis la geston kun la kulturministro Hernán Lombardi kaj la guberniestro de Bonaero, Mauricio Macri.

Tiu ĉi kulturresta etoso estis pli ol oportuna por la disvastigo de tiel libra lingvo, kia estas Esperanto. Tial Silvian akompanis ĉien instruistino Petra Smidéliusz: jen por rapida Esperanto-kurso, jen por intervjuo en vaste aŭskultata radiostacio.

Diplomita profesoro pri la hispana kaj angla lingvoj en Budapeŝto, Petra nun rondvojaĝas tra Sudameriko. Instruante Esperanton en Brazilo kaj vizitinte ankaŭ Ĉilion, ŝi nun gastas en la lulilo de tango. “Marde mi donis prelegon en mezlernejo por 200 gejunuloj... Kiam mi parolis pri *Pasporta Servo*, multaj ĝojkriegis kvazaŭ ĉe piedpilka matĉo. Multaj ekinteresiĝis kaj volas lerni Esperanton. Mi ankaŭ gvidos tri malfermajn lecionojn ĉe la turo... Hodiaŭ mi organizis junularan kunvenon. Sabate mi gvidos kurseton por instruemantoj”, — rakontis la juna hungarino.

Fine de majo oni malmuntis la turon kaj ĉiu vizitanto rajtis forporti unu libron. La cetero eniros la trezoron de la unua mult-lingva biblioteko starigota en Bonaero. La Esperanto-instruistino oni ne rajtas forporti.

Francisco L. Veuthey  
Dokumentujo de [www.edukado.net](http://www.edukado.net)

## Iberia Renkontigo

Kataluna Esperanto-Junularo organizis la ĉi-jaran Internaciisman Renkontiĝon kadre de la Iberia Serio en sia 7a eldono, organizata ĉiun jaron laŭvice de portugaloj, hispanoj kaj katalunoj. La Renkontiĝo okazis 13–15 maj 2011 en la regiono de Ĝirono: en Sant Andreu Salou, en Cassà de la Selva kaj en Ĝirono. Partoprenis sepdeko da esperantistoj kaj Esperanto-amikoj venintaj el Germanio, Arpitano, Kastilio, Estonio, Francio, Italio, Okcitanio, Pollando, Ruslando kaj eĉ el Japanio.

Post akceptado en la urbodomo de Cassà fare de la urbestro kaj la magistratano pri kulturo, ni iris al la loka biblioteko, kie Kataluna Esperanto-Asocio faris malavaran libro-donacon por la nova priesperanta sekcio. Re prezentanto de Hispana Esperanto-Federacio kontribuis al la donaco per ekzemplero de *El hombre que desafiò a Babel*.

En la gastejo *Can Maiol*, en Sant Andreu Salou, okazis la prelegoj, debatoj kaj atelieroj. Pri la nokta programo zorgis la Leo Sakaguchi, dum la trinkejo proponis plej tradiciajn drinkaĵojn. Ankaŭ okazis ateliero pri popoldancoj fare de Mon Cardona por pretigi la partoprenantojn al la balo de *Kaj Tiel Plu*. Dimanĉe oni vizitis la urbon Ĝirono; dum majo la urbo estas ĉie flore ornamita. Adiaŭa bankedo fermis la renkontiĝon.

Ferriol Macip i Bonet

## IJF: denove je la Pasko

Kiel en la antaŭaj jaroj, ankaŭ ĉi-jare en Italujo je la Pasko okazis Internacia Junulara Festivalo — nun en Ligurio ĉe la plaĉa vilaĝo Pornassio, malmultajn kilometrojn distanca de la Liguria marbordo.

La tradicia festivalo kunigis 20—26 apr pli ol 70 partoprenantojn el diversaj landoj el tri kontinentoj. Dum la festivalo okazis koncertoj de JoMo, *Inicialoj DC*, *Rêverie* kaj aliaj, sed ankaŭ prelegoj, lecionoj kaj ekskursoj al Ĝenovo kaj al Savono, dum kiu kelkaj koraĝuloj eĉ baniĝis!

Kvankam oni jam prilaboras ĝin, ankoraŭ ne estas konata la loko de la venonta IJF; sed, kiel kutime, ĝi Pasko estos, inter la 4a kaj la 10a de aprilo 2012. Informiĝu ĉe Itala Esperantista Junularo:

[iej@esperanto.it](mailto:iej@esperanto.it)  
<http://iej.esperanto.it/>

Pierre Caliarì





## Pokalo Kostrena

Jam la dekan sinsekvan jaron okazis konkurso pri scio de Esperanto por lernantoj el elementaj (ok-klasaj) kaj mezaj lernejoj. Ĉi-jare oni konkursis 20–22 maj en la skolta ripozejo *Esperanto-Domo* en la ĉemara kroata urbeto Kostrena, apud Rijeka.

La konkurson partoprenis 17 gelernantoj el tri elementaj kaj tri mezaj lernejoj. Gelernantoj faris skriban ekzamenon kaj konkursis en tri kategorioj A (komencantoj), B (progresantoj) kaj C (eseo).

**En la kategorio A** la unuan premion ricevis Sara Koprivica kaj la duan Matko Petrović ambaŭ el la elementa lernejo *Retkovec* (Zagreb), la trian premion ricevis Marija Vešnik el *EL Mladost* (Zagreb).

**En la kategorio B** la unuan premion gajnis Tanja Rubić, la duan Ana Maričić kaj la trian Iva Međeši — ĉiuj el la lernejo *Retkovec*.

**En la kategorio C** la unuan premion ricevis Dorotea Martinec el la 4a Zagreba gimnazio, kaj la duan premion ricevis Ernesto Rey Hudeček el la hotelurisma mezlernejo el Zagreb. Per la pokalo *Kostrena 2011* estas premiita la Zagreba elementa lernejo *Retkovec*, kiel la plej bona lernejo.

La plej sukcesaj lernantoj (unuaj tri lokoj) estis premiitaj per diplomoj kaj pokaloj. Ĉiuj lernantoj ricevis kiel donacon la libron *Damoruov život* (La vivo de Damoru) de la bengala verkisto Trai-lokyanath Mukhopadhaj. La libro estas tradukita en la kroatan pere de Esperanto el la bengala kadre de la Eŭropunia projekto “Unu hind-unia infanlibro en Eŭropo — tri eŭropaj infanlibroj en Hinda Unio”. Gelernantoj kaj iliaj gvidantoj ĝuis marbanadon ĉe apudaj plaĝoj.

La konkurson organizis Kroata Esperanto-Ligo, Unuiĝo de Prelegantoj de Esperanto kaj Esperanto-Societo Rijeka. La konkurso okazas ĉiujare en majo.

**Vjekoslav Morankić**

Unu el la novaj nomŝildoj en Herzberg



Halina Gorecka en la jubilea festo en *Justo* (Fotis Irina Gončarova)

## La Esperanto-urbo en majo

7 maj aperis novaj, publike videblaj Esperanto-reklamiloj en la Esperanto-urbo Herzberg. 53 arboj ĉirkaŭ la urbo-meza Jues-lago ricevis ŝildojn kaj tiel ekestis interesa promenovo, kie oni povas lerni la nomojn de arboj en la germana, latina kaj en Esperanto. La projekto, en kies kadro aperis ankaŭ trilingva broŝuro kun mapo, realiĝis danke al la kunlaboro de la loka grupo Zukunfts-werkstatt, naturprotektita asocio NABU kaj Interkultura Centro Herzberg (ICH).

20–22 maj okazis en Herzberg la 51a klerigsemajnfino. La ĉeftemoj estis faka terminologio, scienca tradukado, minoritataj lingvoj en Germanio kaj la organiza strukturo de la Esperanto-movado. Post konatiĝo kun multaj fakvortaroj en la biblioteko de ICH la partoprenantoj plenumis praktikajn taskojn: tradukojn de tekstoj pri la Nacia Parko Harz. Ekstis vera metieja kunagado.

Reprezentantoj de ICH, Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar, partoprenis fine de majo Grundtvig-seminarion en Bonn. Ili aŭskultis prelegojn kaj akiris praktikajn sciojn pri administrado, pri fina raportado kaj pri la nova retpaĝaro de EU-projektoj. Tiu paĝaro fariĝas komuna trezorejo por Eŭropo, kie oni povas legi pri sukcese plenumitaj projektoj, pri la rezultoj de internacia kunlaboro. Estis interese lerni pri novaj ideoj, kaj estas bone, ke la enhavo kaj rezultoj de la Esperanto-klorigprogramo por la generacio 55+, ellaborita de PEA, E@I kaj ICH, estos publike atingebla inter aliaj Eŭropaj projektoj.

**ICH**

## La Ondo jubileis en Moskvo

Unuafoje en la dudekjara historio de la ekzistado de la Rusia Esperantista Unio (REU) kaj de la magazino *La Ondo de Esperanto*, ambaŭ (re)fonditaj en 1991, ili organizis komunan kunvenon, en kiu tute ne sentiĝis laŭdire malvarmaj rilatoj inter la du establoj.

6 jun 2011 la Moskva jura universitato *Justo* gastigis festkunvenon okaze de la duobla jubileo de *La Ondo de Esperanto*: la 20-jara datreveno de la relanĉo de *La Ondo* kaj apero de ĝia 200a numero. La kunvenon komune organizis la redakcio de *La Ondo* kaj REU. Ĉeestis trideko da esperantistoj.

La rektoro de *Justo* Gennadij Ŝilo malfermis la kunvenon kaj prezentis la eldonanton kaj la redaktoron de la jubileanta magazino — Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov — kaj solene enmanigis al ili honoran diplomon pro la longa kaj fidela agado por Esperanto.

Aleksander Korĵenkov rakontis pri la historio de la malnova *La Ondo de Esperanto*, kiun Aleksandr Saĥarov eldonis en Moskvo dum 1909–1917; poste li traktis la novan historion de la revuo, refondita en majo 1991 en Sverdlovsk (nun Jekaterinburg); estis ekspoziciitaj pluraj revu-numeroj el diversaj epokoj de *La Ondo* kaj *Sezonoj*. Halina Gorecka detale rakontis pri la enhavo de la jubilea 200a numero (junio 2011).

La eldonanto kaj la redaktoro respondis la demandojn de ĉeestantoj. Estis voĉlegitaj kelkaj gratuloj, interalie, de la prezidanto de REU Grigorij Arosev, kiu ne povis ĉeesti pro eksterlanda vojaĝo. Valentin Melnikov rakontis pri sia multjara kunlaboro kun *La Ondo de Esperanto* kaj dankis al Aleksander Korĵenkov, kiu helpis lin iĝi renoma Esperanto-literaturisto.

Kelkaj dezirantoj abonis *La Ondon* laŭ speciale rabatita prezo, kaj danke al tio *La Ondo* nun havas en Ruslando pli da abonantoj ol en la fino de la pasinta abon-jaro. Funkciis ekspozicieto kaj libroservo.

Post la bondezira tosto de la vicprezidanto de REU Svetlana Smetanina, kiu esprimis la deziron pri pli oftaj kontaktoj inter la landa asocio kaj *La Ondo de Esperanto*, la redakcio abunde regalis ĉiujn per ĉampano kaj bongustaj manĝaĵoj, ĝuante kiujn la ĉeestantoj interparolis en malstreĉa maniero, plilongiginte la planitan kunvenodaŭron je unu plia horo.

**Valentin Melnikov**

## La unua agnosko de la Civito

“La Esperanta Civito, reprezentata de sia Konsulo, kaj la Kabinda Respubliko, reprezentata de sia Kanceliero, agnoskas reciproke unu la alian subjektoj de internacia juro, kaj ili starigas sian legacion ĉe ĉiu subjekto laŭ la reguloj de diplomatio”.

Per tiu deklaro en tri lingvoj (Esperanto, franca, fjota) okazis la unua agnosko pri la Esperanta Civito kiel subjekto de internacia juro 3 jun 2011 en Milano, kun la unuanima aprobo de la Senato. Antaŭ la subskriboj la Kabinda kanceliero, d-ro Joël Batila, koncize retrospektivis la historion de Kabindo, el protektorato de Portugalio ĝis teritorio sub la okupacio de Angolo. Siavice la Konsulo, Giorgio Silfer, rememorigis pri la rilatoj de la Esperanta Civito kun la membroj de la Organizo de Nereprezentitaj Popoloj UNPO, kie ĝi estas observanto kaj Kabindo plena membro. Silfer emfazis, ke la Konstitucia Ĉarto de la Esperanta Civito estis la modelo por tiu de la sendependa Kabinda Respubliko.

La agnoskan deklaron akompanas akordo inter la du subjektoj, aprobita kaj subskribita surloke, kiel aneksaĵo al la deklaro. La akordo enhavas sep punktojn, kiuj reguligas la kooperadon inter la du subjektoj. Projektoj de kooperado estos disvolvigitaj en la lingva kaj la diplomacia terenoj, kaj en tiu de la publika administracio. Esperanto estos unu el la oficialaj lingvoj de la Kabinda kancelario, kies oficistoj estos lingve formitaj danke al la Esperanta Civito. La Kabinda Respubliko mem faros ĉion eblan por la disvastigo de la uzo de Esperanto tra la afrikaj landoj kun kiuj Kabindo rilatas.

Post ĉi tiu ceremonio komenciĝis la laborsesio de la parlamento de la Esperanta Civito. La Civito havas federisman strukturon: la aliĝintaj establoj estas reprezentataj en la Forumo; la membroj aŭ abonantoj de tiuj establoj rajtas peti la civitanecon kaj tiel elekti la Senaton. La Forumo kaj la Senato, kiuj kune formas la parlamenton de la Civito, havis siajn sesiojn 3 jun 2011 en Milano.

La Senato en sia sesio aprobis rekomendon por la okazigo de ĉiujara kongreso de raŭmismoj. La rekomendo allasas la eblecon, ke la raŭmismoj kunvenos dum aŭ apud ia internacia kongreso, esperantista aŭ ne. Se ne jam en 2012, certe en aprilo 2013 la Afrika Kongreso en Esperanto estos tia kongreso. En Burundio okazos ordinara parlamenta sesio kaj aliaj aranĝoj. Sen. Ljubomir Trifončovski proponis ke la Kapitulo



esploru la eblecon organizi la elektojn al la Senato ankaŭ rete. La koncerna rekomendo estis aprobita unuanime. Ĝis nun la elektoj okazis ĉiam per ordinara poŝto, se la voĉdonanto ne povis persone alesti.

La Forumo, en kiu partoprenis 13 el la 25 voĉrajtaj paktintaj establoj, elektis tripersonan Kortumon de la Civito por la jarduo marto 2012 – marto 2014: Bertil Nilsson, Kep Enderby kaj Andrès Martín. La Forumo akceptis novajn aliĝintojn al la Pakto, kiuj estas la Esperanto-Societo en Goma (Kongolando) kaj la redakcio de *Femina*. Esperanto-Federacio en Niĝerio estas konsiderata kiel ekziĝinta el la Pakto.

**HeKo**

## ILEI nestis en kastelo

Kvardeko da homoj el kvin landoj kunvenis dum la unua majsemajno en la kastelo Greziljono por kleriĝi kaj taksigi. El Budapeŝto alflugis la ILEI-prezidanto persone Stefan MacGill por instrui “verve pri verboj” kaj atingi B2-nivelon laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER). El Tuluzo alvenis freŝa diplomito el la Poznana universitato, sperta instruanto, Christophe Chazarein, kies kursocelo estis akiri la nivelon B1 laŭ KER. Dum ses tagoj okazis du intensaj



kursoj, antaŭ- kaj posttagmeze, sekvataj de distraj aktivaĵoj post la tag- kaj vespermanĝoj. Fine de la kursa semajno alkuris Katalin Kováts por ekzameni 32 kandidatojn laŭ KER.

Legu la personan impreson de la plej malproksimaj partoprenintoj, Anna kaj Mati Pentus el la Ruslanda ĉefurbo:

«Dum la staĝ-semajno en Greziljono realiĝis niaj du deziroj: loĝi iomete en fabela kastelo kaj paroli nur en Esperanto. La kastelo mem estas admirinda. Ĝi havas endajn trajtojn de kasteloj: turetojn, almenaŭ unu vere antikvan fenestron, multajn koridorojn (tute ne sombrajn!), luksan ĉefŝtuparon kaj heliĉajn ŝtuparojn, malgrandajn ĉambretojn kaj grandan manĝoĉambron.

« La kurson por progresantoj gvidis Stefan MacGill. La du ĉefaj temoj de la kurso estis verbo kaj instruado. La kursanoj ĉiam memoros Agenton 005 (kaj lian kamelon!) kaj liajn aventurojn en Volapukistano. Stefan havas tre gravan por bona instruisto kvaliton: li ĉiam parolas sufiĉe malrapide kaj tre kompreneble, eĉ kiam li entuziasmiĝas. Sed parolis ni pli multe ne dum la lecionoj, sed dum la manĝoj, pri tute diversaj temoj en tre bona amikeca etoso. La manĝaĵoj estis tre diversaj kaj tre bongustaj, pro tio ni tre dankas la skipon de kuiristoj!

« Estis tre agrable, ke ĉiuj partoprenantoj de tiu ĉi staĝo venis kun seriozaj intencoj, ĉiuj vere deziris lerni kaj perfektigi sian konon de Esperanto. Do, ni diligente lernis dum kvin horoj ĉiutage, sed inter kaj post la studado ni tre bone amuziĝis danke al la senlaca organizanto Jannick Huet-Schumann. Ŝi havis bonegan programon por ĉiu tago: jen ekskurso tra la ĉirkaŭaĵoj, jen marŝo al dolmeno, jen konatiĝo kun vidindaĵoj de Baugé. La broŝuro pri la urbeto en Esperanto estis ege utila, kaj la ekskurso mem estis tre bona! Tre plaĉis al ni vespera spektaklo fare de Stefan MacGill kaj biblioteka vespero. Neforgesblaj estas koncerto de la akordionistoj Albert kaj Patrice, dancado de la plej kuraĝaj kursanoj kaj posta kunkantado. La staĝon kronis ekzamenoj. Jes, ekzamenoj ĉiam estas nervoziga afero, sed danke al la bona organizado kaj tre simpatiaj ekzamenantoj ĉio pasis tute ne tiel terure, kiel oni kutime imagas al si».

En la Esperanto-kastelo Greziljono (vidu freŝan foton maldekstre) en julio kaj aŭgusto okazos varia programo kun 10 kursoj, 20 intervenantoj, 30 aktivaĵoj dum 40 tagoj:

<http://gresillon.org/agendo>

**Bert Schumann**

## ĈEL marŝas kun espero

La 20an de majo Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL) okazigis festkunvenon okaze de sia 60-jara jubileo. Pli ol 260 esperantistoj partoprenis la kunvenon kun la temo “Marŝi kun espero”.

Komenciĝis la kunveno en harmonia atmosfero. Prezidis ĝin Yu Tao, vicprezidanto kaj ĝenerala sekretario de ĈEL. Ĉeestis la kunvenon multaj altrangaj gvidantoj, inkluzive de prezidanto kaj vicprezidanto de Ĉina Fremdlingva Eldona kaj Distribuata Administracio, honora prezidanto de Mongola Esperanto-Ligo, oficistoj de Islanda, Hungaria kaj Pollanda ambasadoj en Ĉinio, vicprezidantoj de Japana kaj Korea Esperanto-Asocioj kaj ankaŭ gvidantoj de *El Popola Ĉinio*.

Profunde impresis ĉiujn la video-filmo *Marŝi kun espero* pri la 60-jara historio de ĈEL kun paroloj de veteranaĵ kaj junaj Esperantistoj kaj ankaŭ koncernaj gvidantoj subtenantaj la Esperanto-movadon.

Poste, Guo Xiaoyong, vicprezidanto de Ĉina Fremdlingva Eldona kaj Distribuata Administracio kaj la unua vicprezidanto de ĈEL, faris raporton. Li diris, ke disvolviĝo de Esperanto en Ĉinio estas strikte ligita kun la socia progreso, kaj ĈEL kunligis la popolan diplomation kun eldonado de la revuo *El Popola Ĉinio* kaj Esperanto-libroj, kaj per tio multe kontribuis por havigi subtenon kaj komprenon de la internacia komunumo al la nova Ĉinio kaj al la ĉina popolo. Li dankis pro la subteno kaj esprimis la esperon, ke ĈEL daŭre servos per Esperanto por konstruado de la harmonia mondo kun eterna paco kaj en komuna prospero.

Renato Corsetti en sia salutparolado diris, ke nun Ĉinio estas la plej rimarkinda evoluanta potenco-lando en la mondo, kaj la mondo estas pli kaj pli invadita de ĉinaj varoj, kaj la mondo aŭskultas kiam Ĉinio parolas en la plej malsamaj kampoj de la homa aktivado.

Okazis grava kaj honora evento en la kunveno. Sinjoroj Li Shijun, Xie Yuming kaj Li Sen kaj sinjorino Tan Xiuzhu estis premiitaj de Premio por la Tutviva Atingo en la ĉina Esperantomovado. Li Shijun kaj Xie Yuming ambaŭ estas bonaj tradukistoj de Esperanto. Ili jam tradukis la kvar monumentajn klasikajn romanojn de Ĉinio. Tan Xiuzhu kune kun siaj stabanoj servigis Esperanton al internacia kultura interŝanĝo, al reformado kaj pordomalfermo



En la Pekina festkunveno la ĉefparoladon faris Guo Xiaoyong, vicprezidanto de Ĉina Fremdlingva Eldona kaj Distribuata Administracio kaj la unua vicprezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo.

de Ĉinio; sinjoro Li Sen eldonis multajn Esperanto-librojn por lokaj esperantistoj per sia propra mono kaj daŭre klopodas plenenergie por Esperantomovado de internaciaj fervojistoj.

Reprezentante veteranajn kaj junajn Esperantistojn, Li Shijun kaj sinjorino Chen Ji faris parolojn. Chen Haosu, prezidanto de ĈEL kaj prezidanto de Ĉina Popola Asocio de Amikeco kun Fremdaj Landoj, gratulis la 60-jaran jubileon kaj emfazis, ke kun subteno de la registaro kaj diversaj rondoj, ĈEL persistos en sia celo: senlaca klopodo por amikeco kaj kunlaboro inter la ĉina popolo kaj diverslandaj popoloj, por mondopaco kaj komuna disvolviĝo.

Per kunkanto de la bela himno *La Espero* la kunveno finiĝis en granda sukceso. Ĝi montris, ke en la venontaj jardekoj ĈEL povas ludi pli gravan rolon en la Esperanto-movado.

EPĈ

## Ĉinio: Aglido-Agado

En la Zaozhuang-a Universitato (Ĉinio) komenciĝis la Aglido-Agado, kies celo estas kreskigi kaj esperantistigi gestudentojn kiel aglidojn helpe de spertaj alilandaj esperantistoj kiel agloj. Nun kadre de la Aglido-Agado 14 agloj el Koreio, Japanio, Usono, Ruslando, Brazilo, Kubo, Kanado, Vjetnamio, Sud-Afriko kaj Kroatio prizorgas 19 aglidojn el la Zaozhuang-a Universitato.

Ili korespondas aŭ babilas rete. Ĉiu aglo “nutras” kaj “prizorgas” de unu ĝis tri aglidojn. La periodo de la “nutrado” kaj “prizorgado” daŭras 6–10 monatojn. Poste la agloj ekzamenos kaj kontrolos la kreskadojn de la aglidoj. La loka asocio membrigos la aglidojn kaj donos al ili atestilojn kiel al heroaj agloj.

Por subteni la agadon, skribu al la kunordiganto: ✉ [semio@163.com](mailto:semio@163.com).

Semio

## Esperanto en supera mezlernejo

La 14a Supera Mezlernejo de Dandong (Liaoning, Ĉinio) havas pli ol du mil studentojn kaj 174 geinstruistojn.

Danke al raporto de s-ino Li Yanqiu, altranga instruistino de la lernejo, vicprezidantino de Dandong-a Esperanto-Asocio kaj membro de ILEI, la altlerneja estraro decidis enkonduki Esperanton kiel studobjekton de la dua studjaro, tamen ne tre optimisme, ĉar ne estas konate, ĉu la kurso estos sukcesa.

31 maj 2011 la kurso estis funkciigita en zorge aranĝita klasĉambro. Kun scivolemo kaj intereso 26 studentoj venis al la kurso de Li Yanqiu (vd. la suban foton). La estraro tre ĝojas pro tio kaj esperas, ke Esperanto povas vere ludi rolon ne nur por vastigi internacian vidkampon de studentoj, sed ankaŭ en elbakado de kvalifikitaj studentoj.

Wu Guojiang



## Unufraze

★ Je 17 jun 2011 entute 1366 kongresanoj el 67 landoj aliĝis al la 96a UK en Kopenhago; plej multe el Francio 174, Germanio 136, Japanio 100, Danlando 87, Pollando 69, Brazilo 59, Nederlando 59, Ruslando 56, Italio 55, Svedio 51. (uea.org)

★ La agentejo por profesia edukado ĉe la Ministra Konsilantaro de Bulgario donis licencon al la Internacia Esperanta Centro por Profesia Edukado; laŭ la licenco la oficiala studlingvo de la Centro estas Eo, dum la angla, rusa, germana k franca estas libervolaj duaj studlingvoj post Eo, kiu estas deviga por ĉiuj. (Boĵidar Leonov)

★ 14 jun 2011 sur la fasado de la mezlernejo en la kroata urbo Vrbovec estis starigita memortabulo okaze de la centjariĝo de Josip Velebit, kroata k Ea poeto, kiu estis instruisto en ĉi tiu lernejo; la tabulo mencias lian esperantist-econ. (Spomenka Štimec)

★ Chen Shi, direktoro de la redakcio de *El Popola Ĉinio* k Ragnar Baldursson, ministro-konsilanto de la Islanda ambasado en Ĉinio, interkonsentis pri lanĉo de retpaĝoj de [www.arcticportal.org](http://www.arcticportal.org) en la lingvoj angla, ĉina k Eo, k pri kursoj de la ĉina k Eo. (EPĈ)

★ La abonantaro de *Literatura Foiro* elektis la novelaron *Vizaĝoj*, al kiu kontribuis dudek naŭ aŭtoroj, kiel la Verkon de la Jaro 2010; la premion de la Ea PEN do gajnis, unuafoje, kolektiva verko. (HeKo)

★ En la apudbalatona Hungaria urbeto Alsoörs 27–29 maj okazis, jam la 11an fojon, la tradicia politika E-diskuto ĉi-foje kun la ĉeftemo “Priparolo kaj kritika pritrakto de la nova federacia programo de Eŭropo-Demokratio-Esperanto”. (Eugenio Macko)

★ 14 maj en la restoracio *Musume* en la ĉefurbo de Meksiko 47 personoj ricevis atestojn pri fino de elementa E-kurso, kiu daŭris dum 15 semajnoj en du grupoj. (MEF)

★ La Asembleo de la Ea PEN-Centro elektis 3 jun en Milano novan prezidanton: Bertil Nilsson, literatura tradukisto, redaktoro k publicisto. (HeKo)

★ La Estraro de TEJO elektis novan volontulon, Sébastien Denux el Francio, kiu aŭguste transprenos la postenon de Manuela Ronco k eklaboros en la CO en Roterdamo. (tejo.org)

## Diplomiĝu per/pri Esperanto

Ĉu vi volas havi larĝan scion pri esperantologio?

Ĉu vi volas partopreni la kursojn de famaj esperantistaj fakuloj?

Ĉu vi volas havi unikan universitan kursfinan diplomon?

Ĉu vi volas instrui poste en oficiala kurso?

Ĉu vi volas pasigi instigan semajnon en internacia studema rondo en Meza Eŭropo?

Se jes, aliĝu al la denove startontaj interlingvistikaj studoj de UAM!

La Universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznano, ofertas trijaran eksteran postdiplomon studadon pri interlingvistiko. La kursaro okazas en la Lingvistika Instituto, sub la gvido de Iлона Koutny kaj kun kontribuo de elstaraj esperantologoj kiel Věra Barandovská-Frank, Detlev Blanke, Vilmos Benczik, Tomasz Chmielik, Ziko van Dijk, Michel Duc Goninaz, István Ertl, Michael Farris, Zbigniew Galor, Aleksander Korĵenkov, Katalin Kováts, Lidia Liĝeža, Aleksander Melnikov, Humphrey Tonkin, Kristin Tytgat, John Wells.

La Interlingvistikaj Studoj donas superrigardon pri ĝenerala kaj aplikata lingvistiko, fokusiĝas al internacia kaj interkultura komunikado, traktas planlingvojn kaj detale okupiĝas pri la gramatiko, literaturo, kulturo kaj historio de esperanto. En la tria jaro eblas specialiĝi pri komunikado, lingvistiko, literaturo, tradukado, planlingvistiko aŭ pri lingvopedagogio. Pro la metodika formado la Studoj ricevas specialan rolon en la instruista trejnado. Ekde la studjaro 2007/08 realiĝas kunlaboro kun ILEI kaj Edukado.net.

Unusemajnaj intensaj sesioj (surlokaj kursoj kun po 4 studobjektoj kaj ekzamenoj) okazas unufoje dum la semestro (fine de septembro kaj komence de februaro), intertempe la studentoj laboras pri siaj taskoj hejme kaj konsultiĝas rete kun la prelegantoj. Post pretiĝo

de diplombolado kaj fina ekzameno ili ricevos atestilon pri postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj.

Partoprenantoj povas aliĝi por la studjaro 2011/12 ĝis 15 aŭg 2011. La unua sesio okazos 17–21 sep 2011. Tuj poste sekvos dutaga Interlingvistika Simpozio kaj la tradicia ARKONES.

Postuloj: diplomo pri superagradaj studoj kaj bona scio de Esperanto.

Kotizo por unu semestro: 1850 PLN (ĉ. 460 EUR), reduktita 700 PLN (ĉ. 175 EUR) por B-landoj. Kelkaj stipendioj estas antaŭdataj danke al Esperanto Studies Foundation, UEA kaj ILEI.

Pluaj informoj kaj aliĝo:

[interlin@amu.edu.pl](mailto:interlin@amu.edu.pl)

[ikoutny@amu.edu.pl](mailto:ikoutny@amu.edu.pl)

<http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/index.html>

## ARKONES denove invitas

27aj ARTaj KONfrontoj en ESperanto ARKONES okazos en Poznań (Pollando) 23–25 sep 2011. La organizantoj promesas impresi partoprenantojn per abunda programo. Ĝi konsistas el tri branĉoj: la unua inkluzivas artajn kaj kulturajn programojn, la dua — prelegojn kaj klerigajn programojn, kaj la tria — programojn ligitajn kun la pasintaj kaj aktualaj defioj de la Esperanto-movado.

ARKONES estas tute aparta kaj karakteriza renkontiĝo, kiu, unuflanke, inkluzivas sciencajn prelegojn kaj seriozajn diskutojn kaj, aliflanke, prezentas abundecon de la Esperanto-kulturo en ĝiaj pluraj aspektoj. Krome, dum la vendreda kaj sabata vesperoj oni invitos partoprenantojn distriĝi per kaj por Esperanto. Bonaj Esperantaj koncertoj kaj agrabla etoso ne malhelpos.

En la nuna Jaro de Junularo oni volas plifortigi la rilatojn kun junaj esperantistoj. Pro tio ARKONES okazos sub la aŭspicioj de TEJO.

Legu pli rete: [www.arkones.org](http://www.arkones.org)

Tobiasz Kaźmierski



Eventoj

## La klimata problemo revenis!

de Dafydd ab Iago

En la lastaj jaroj ŝajnis, ke la ekonomiaj problemoj de Eŭropo, en la mensoj de civitanoj kaj politikistoj, pli gravis ol la klimata problemo.

Tamen je la pinto-konferenco de la plej industrie evolu-intaj landoj en majo 2001, José Manuel Barroso, prezidanto de la Eŭropa Komisiono, ne sentis sin bone. Ne nur Ruslando kaj Usono multe pli forte prezentis siajn planojn por kontraŭstari la klimatan defion. Eŭropo kaj la mondo ankaŭ daŭre estas sur la malbona vojo.

“Nia piedo estas senmove sur la akcelilo, kaj ni devas frapi la bremsojn, kaj rapide”, — konkludis Barroso.

Kvankam la prezidanto de la Komisiono parolas forte, daŭre mankas efika politiko por kontraŭi la kreskantan uzon de fosilenergio. Ĉiujare, EU importas energion por 300 miliardoj da eŭroj. La energia fakturo de Eŭropo altiĝis je 70 miliardoj da eŭroj en 2010.

Reveninte al Bruselo, Barroso ordonis pli viglan reagon de Eŭropa Unio. Sed ĉu li vere intencis plenumigi tion kion ili duone kaj ŝajne volas evoluigi?

Parolante en konferenco en junio, Barroso alvokis la Eŭropajn politikistojn pensi kiel sciencistoj kaj agi kiel ĉefoj. Li estis parolinta okaze de la publikigo de speciala raporto de la Unuiĝintaj Nacioj pri renovigeblaj energioj kaj kontraŭstaro al la klimata ŝanĝiĝo.

“La sciencon pri klimata ŝanĝiĝo trafis intensa ekzameno en lastaj jaroj, sed ĝi restis postrestinta, ekster ĉia racia



José Manuel Barroso pensas, ke Eŭropo estas sur la malbona vojo.

dubo”, — diris Barroso. Laŭ li, la kialo estas klara: la efikoj de la klimata ŝanĝiĝo estas ege evidentaj.

“Ni devas elspezi nian tempon por solvi la problemon anstataŭ disputi pri ĝi, — daŭrigis Barroso. — Ekstrema vetero estas sur nia sojlo. Plejparto de la Norda Eŭropo spertis sian plej varman kaj plej sekan printempon inter la ĝis nun registritaj”. Barroso referencis al la fakto, ke la Norda Eŭropo ricevis ne pli ol 25% de la kutima pluvokvanto. Alia problemo estas la plej alta produktado da karbono en homa historio. En 2009 estis rekorda jaro kun 30.6 gigatunoj — salto je 5% kompare kun la antaŭa kaj rekorda jaro 2008.

## Esperanto biblioteko estu ankaŭ en Afriko


La fondaĵo “Esperanto en Evoluo” lanĉis kampanjon por kolekti ok mil eŭrojn favore al konstruado de biblioteko en la setlejo Rumonge, Burundo, ĉe la lago Tanganjiko. Oni inventis metodon de “valorcertigilo” por helpi finance la junajn esperantistojn en Burundo. Tiu subskribita papero simbolas la pruntedonon de monsumo de minimume 50 eŭroj. La sumo restos dum minimume tri jaroj en la fonduso por konstruigi la bibliotekon. Post tiu periodo la pruntedoninto rajtas repostuli sian monon.

La Esperanto-asocio de Burundo (ANEB) estis tre aktiva kaj sukcesplena dum la lastaj jaroj. En aŭgusto 2008 ses instruistoj iris al foraj regionoj de la lando por unusemajna seminario, en kiu preskaŭ 100 personoj lernis Esperanton. En 2009 venis instrui Johan Derks kaj Svetlana Milanović el Nederlando. En tiu jaro la nombro de kluboj kreskis al 37. En julio 2010 okazis la dua landa kongreso; okazis en aŭgusto sukcesa seminario en la provinco Bubanza kun partopreno de esperantistoj el Ugando kaj Kenjo.

Lastjare la instrusekcio organizis kursojn kaj renkontiĝojn en diversaj regionoj de Burundo. La junulara sekcio estis akceptita de ILEI dum la Krakova konferenco. Ankaŭ ekzistas sporta sekcio, kun piedpilka teamo, kiu partoprenas en loka turniro. Stariĝis ankaŭ skolta sekcio.

En aprilo 2011 Mireille Grosjean el Svislando instruis en Burundo dum kvin tagoj kaj ekzamenis 14 partoprenantojn, el kiuj 12 sukcesis laŭ la meza nivelo kaj 17 laŭ la elementa nivelo kun 13 sukcesintoj.

Esperanto povos havi briln futuron en tiu lando (kaj en aliaj landoj en Afriko), se la burundaj gvidantoj trovos la rimedojn por starigi bone funkciantan organizaĵon.



Dum du jaroj, ekde 2009, ni reklamis kaj klopodis kaj finfine estis sufiĉe da mono, cetero ĉefe el nia propra poŝo, kaj en novembro 2010 ANEB aĉetis terenon de 425 m<sup>2</sup>, kie ĝi konstruos la bibliotekon. Esperanta biblioteko estas esenca por la junaj esperantistoj, ĉar imagu ke se jam ili trovis monon aŭ afablan eŭropanon por ekhavi lernolibron, tiu estos baldaŭ ĉifonita pro eluzado tra multaj fingroj kaj pro manko de ŝrankoj en iliaj domoj. Kutime eĉ ne estas litkadroj en ilia domo, tiom malriĉaj ili estas. En la Esperanto-centro povos esti gardataj Esperanto-libroj kiel komuna posedaĵo, estos komputilo kun ret-aliro kaj la lokaj esperantistoj povos renkontiĝi.

“Esperanto en Evoluo” havas propran retejon (<http://esp-evoluo.tk>) kaj konton ĉe UEA “e-eer-u”. Simple ĝiru la deziratan sumon al unu el la kontoj de UEA (ekzemple 378964 ĉe ING-bank, IBAN: NL72INGB0000378964, BIC: INGB NL2A) kun mencio de la kodo e-eer-u, ‘valorcertigilo’ kaj via adreso. La estraranoj de “Esperanto en Evoluo” esperas baldaŭ subskribi multajn valorcertigilojn en Kopenhago.

Johan Derks



Anneleen Nys kun grupo da interesatoj en la ĉefurbo de Peruo.

## Leterkesto

Tre estimataj kaj karaj Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov, la “spiritus movens” de la revuo *Ondo de Esperanto*, akceptu mian gratulon okaze de la duobla jubileo!

Dudek jaroj da eldonado kaj eĉ ducent numeroj de la plaĉa revuo estas vere signifoplenaj ne nur en la senco de la sukcese restarigita tradicio de la iama glora revuo *La Ondo de Esperanto*. Via revuo distingiĝas inter pluraj Esperanto-revuoĵoj per enhava diverseco, solida fideblo de presataj artikoloj, demokratia prezento de malsamaj aŭtoroj. Vi jam plugis gravan sulkon sur la Esperanto-tereno. Restu plu optimismaj kaj fortaj, estu bonŝancaj kaj laborpovaj por plia fruktodona plugado!

Vytautas Ŝilas (Litovio)

Mi tutkore subtenas la gratulojn, komplimentojn kaj bondezirojn de viaj legantoj okaze de l’ duobla *Onda* jubileo kaj preskaŭ nenion povas aldoni. *La Ondo* estas vere sendependa magazino, interesa por Ruslanda kaj internacia legantaro, ĉar ĝia enhavo altprofesie poluriĝas, tradiciaj rubrikoj ne malaperas, la novaj aperas nur laŭ neceso ktp — kiel olda profesia ĵurnalisto mi povus multon komplimente diri.

Antaŭen kaj alten, *Ondo*!

Vjaĉeslav Roĵdestvenskij (Ruslando)

6 maj 2011 forpasis

**Jonas Tamošiunas (1941–2011)**

inĝeniero kaj mekanikisto, esperantisto ekde la komenco de la 1960aj jaroj. Li aktivis en Vilno, propagandis Esperanton, redaktis la gazeton *Unuiĝo*, kolektis grandan bibliotekon.

31 maj 2011 forpasis la doĵeno de la Esperanta Civito

**Leendert Cornelis Deij (1919–2011)**

eksmaristo kaj havenfaka instruisto, esperantisto ekde 1935. Gvidis E-kursojn, aktivis en la laborista E-movado, publikigis siajn poemojn, artikolojn kaj recenzojn en pluraj gazetoj. Libroforme aperis liaj verkoj: *Fragmentoj* (poemaro, 1988), *Aminda* (romano 1997) kaj tri porinfanaj kolektoj.

*Ni funebras kaj kondolencas.*

## Anneleen en Sudameriko

La Amerika Fondaĵo de UEA kaj la Fondaĵo *Mondo* (Germanio) lanĉis la ideon okazigi longan instruvojaĝon en Latinameriko. Kiel instruistino estis elektita la 23-jara Anneleen Nys, kiu studis en Barcelona komunikadsciencon. Krome ŝi jam havis spertojn pri diversaj landoj de Latinameriko.

Unue Anneleen vizitis pasint-jare en Kubo ILEI-konferencan kaj la Universalan Kongreson, kiujn sekvis intensa staĝo ĉe Meksika Esperanto-Federacio, dum kiu ŝi organizis kursojn, disdonis flugfoliojn kaj helpis ĉe konferenco en UNAM por informi pri Esperanto kaj varbi por la venonta kurso.

Ŝia unua celo post Meksiko estis la ĉefurbo de Nikaragvo, Managvo. Tie en la foiro pri kulturo kaj amikeco ĉe la Centramerika Universitato pli ol 100 homoj registriĝis por ŝiaj kursoj. Poste okazis pluraj kursetoj en la universitato kaj en la Evangelia Universitato de Managvo. En Matagalpa Anneleen prezentis Esperanton en diversaj lokoj. Okazis prelego por studentoj de lingvistiko kaj du kursoj en kulturaj centroj. Studenta radio intervjuis ŝin. Entute Anneleen restis en Nikaragvo preskaŭ dum tri monatoj.

La sekva lando estis Kostariko, kie ŝi partoprenis kurson de Guido Hernández, kiu dum multaj jaroj instruas Esperanton en la Teknologia Instituto de Kostariko. Kostariko estas inter la plej fortaj Esperanto-landoj de Latinameriko — unu de la ĉefaj Esperanto-instruistoj de Kostariko, Hugo Mora Poltronieri, eklernis Esperanton pro la vizito de Tibor Sekelj.

Post Kostariko, Anneleen flugis al Ekvadoro, kie Esperanto estas malmulte konata — nur unu ekvadoriano foje partoprenis UKon... Ŝi instruis Esperanton en la ĉefurbo Quito, interalie, en la lingvocentro de la Katolika Universitato, kaj ĉeestis la fondon de Ekvadora Esperanto-Asocio, kiu unuigas kelkajn lernantojn de *lernu!* Anneleen vizitis ankaŭ la urbon Guayaquil, kie vivas kelkaj individuaj parolantoj.

Post Ekvadoro sekvis Peruo, kie la intereso por Esperanto estis granda. En la universitata urbo Huaraz Anneleen organizis diversajn kursojn kaj lingvoprezentojn. En la lingvolernejo Santiago Antúnez, Anneleen prezentis la lingvon al ĉirkaŭ 30 infanoj inter 15–17-jaraj.

En la ĉefurbo Lima ŝi renkontiĝis kun lokaj esperantistoj. Krome Anneleen pendigis multajn afiŝojn en la ĉefurbaj universitatoj, kaj en loka kafejo organizis renkontiĝon kun interesatoj. La Ministerio pri Kulturo organizis por Anneleen prezentadon kadre de la “ĵaŭdaj kulturtagoj”. Ŝi prezentis kaj instruis Esperanton ankaŭ en la turisme alloga urbo Cusco kaj en la suda urbo Arequipa.

Anneleen nun estas en Bolivio, kie Esperanto apenaŭ ekzistas. Poste tra Paragvajo (kie ŝi eble restos kelkajn tagojn) ŝi vojaĝos al San-Paŭlo (Brazilo), kie okazos Tutamerika Esperanto-Kongreso (TAKE).

Anneleen helpas al Esperanto; nun vi helpu ŝin kaj donacu iom da mono. Pri la help-maniero petu informojn rete:

✉ [nysanneleen@gmail.com](mailto:nysanneleen@gmail.com) ✉ [Esperantst@gmail.com](mailto:Esperantst@gmail.com)

Martin Schäffer

	<p><b>Radio Esperanto</b></p> <p><i>Halina kaj Aleksander parolas el Ruslando</i></p> <p>Podkasta servo de <i>La Ondo</i></p> <p>Aŭskultu: <a href="http://la-ondo.rpod.ru">http://la-ondo.rpod.ru</a></p>
--	--

## Savi la vivon!

Trevor Steele (Aŭstralio) . . . . .	50,00
Alfred Heiligenbrunner (Aŭstrio) . . . . .	100,00
Michael Cwik (Belgio) . . . . .	1000,00
Jacques Lemaire (Belgio) . . . . .	100,00
Eric Walker (Britio) . . . . .	220,00
Roger Siarri (Francio/Korsiko) . . . . .	200,00
Françoise Ziegler (Francio) . . . . .	50,00
Anonima (Francio) . . . . .	300,00
EsperantoLand (Germanio) . . . . .	50,00
Karl Breuninger (Germanio) . . . . .	200,00
Bernhard Eichkorn (Germanio) . . . . .	100,00
Horst Vogt (Germanio) . . . . .	110,00
Anonima (Germanio) . . . . .	10,00
Manuel Parra (Hispanio) . . . . .	600,00
Geoffrey Greatrex (Kanado) . . . . .	47,62
Gražna Opulskienė (Litovio) . . . . .	50,00
Claude Nourmont (Luksemburgio) . . . . .	100,00
Tobiasz Kaźmierski (Nederlando) . . . . .	20,00
Jacques Tuinder (Nederlando) . . . . .	100,00
Peter Baláž (Slovakio) . . . . .	100,00
Maria Minichova (Slovakio) . . . . .	100,00
Claude kaj Andrée Gacond (Svislando) . . . . .	200,00
Oleksandr Petruska (Ukrainio) . . . . .	20,00
Anonima (Usono) . . . . .	100,00
Nick Kalivoda (Usono) \$60 . . . . .	41,96
Aria Kauanen (Finnlando) 100 zł . . . . .	25,38
Studentinoj de Universitato de la Tria Aĝo en Olsztyn 85,00 zł . . . . .	21,68
Partoprenantoj de la Tutpollanda Esperanto-Kongreso en Nowy Sącz 400,00 zł . . . . .	101,52
Daniela Emler (Pollando) 100 zł . . . . .	25,51
Elżbieta Frenszkowska (Pollando) 113,80 zł . . . . .	29,03
Marian Możuch (Pollando) 120 zł . . . . .	30,69
Janusz Pokrzywnicki (Pollando) 200 zł . . . . .	50,76
Hanna Skalska (Pollando) 1000,00 zł . . . . .	254,45
Andrzej Sochacki (Pollando) 50 zł . . . . .	12,69
Bronislav Ćupin (Ruslando) 585,00 rub. . . . .	14,62
Vjačeslav Rojdestvenskij (Ruslando) 500,00 . . . . .	12,50
<b>Entute ekde 6 maj ĝis 15 jun 2011 . . . . .</b>	<b>4.548,41 eŭroj</b>
<b>Je la 5a de majo 2011 . . . . .</b>	<b>17.238,09 eŭroj</b>
<b>Je la 15a de junio 2011 . . . . .</b>	<b>21.786,50 eŭroj</b>

Koran dankon pro la donacoj kaj pro la kortuŝaj sandeziroj! Donacoj estas plu akceptataj ĉe la UEA-konto “gore-z”. Oni povas pagi ankaŭ al kelkaj bankaj kontoj (eŭra, rubla, zlota), per PayPal, kaj per Jandeks-denĝi. *Aleksander Korĵenkov*

## Aĉetu librojn de Sezonoj

Estas diversaj eblecoj helpi al Halina Gorecka en ŝiaj malfacilaj cirkonstancoj: ekzemple, mondonacoj kaj dumvivaj abonoj. Ni tamen ne forgesu, ke ankaŭ la aĉeto de libroj helpas al Halina.

Germanaj esperantistoj iniciatis kampanjon por aĉeti librojn de *Sezonoj*, kiuj poste estos donacataj al bibliotekoj kaj vendataj al dezirantoj. Al la kampanjo aliĝis alilandaj samideanoj, kaj tio ebligis mendi librojn por pli ol sep mil eŭroj, kio, laŭ *Sezonoj*, estas la plej granda “libromendo” kiun la eldonejo ricevis dum sia eldona aktivado. Tiel oni ankaŭ finance kontribuas kaj samtempe ricevas bonan kulturen valoron.

Post la fino de la kampanjo kaj de la sendado de la libroj el Ruslando al Germanio, en *La Ondo de Esperanto* kaj en la retejo *La Balta Ondo* aperos la listo de la donacintoj, **M. S.**

## Gajnu komputilon ĉe lernu!

Okaze de la registriĝo de la centmila uzanto ĉe [lernu!](http://lernu.net) ni aranĝas grandan konkurson kun valoraj premioj! Ĉiu deziranto povas partopreni kaj gajni porteblan aŭ mini-komputilon. Necesas krei amuzan kaj interesan reklamon pri *lernu!*

La konkurso daŭros ĝis la 31a de julio, 2011. Ne preterlasu la eblon montri viajn kapablojn, ĝui la premion kaj samtempe fari reklamon por Esperanto kaj *lernu!* kaj tiamaniere helpi nin disvastigi la lingvon!

Dum pli ol okjara ekzisto *lernu!* de tre malgranda kaj modesta retejo kreskis ĝis granda portalo, tradukita en pli ol 30 lingvojn. Nun ĝi estas la plej granda reta Esperanto-kursejo en la tuta mondo. Sed *lernu!* estas ne nur granda amaso da retpaĝoj, ĝi unuavice estas granda komunumo kun pli ol 150 mil unikaj vizitantoj, kiuj ĉiumonate trarigardas kelkajn milionojn da paĝoj, kaj kelkcent helpantoj: tradukantoj, lingvohelpantoj, vortaristoj, programistoj kaj desegnistoj, kiuj ĉiutage laboras por ke la paĝaro restu viva kaj funkcia. Kaj nun ni povas diri, ke *lernu!* ankaŭ estas la komunumo kun **cent mil registritaj uzantoj!** Ankaŭ vi estas eble parto de tiu komunumo.

Okaze de tiom grava evento *lernu!* aranĝas grandan konkurson kun valoraj premioj:

— Portebla komputilo *Acer Aspire* (Intel Dual core P6100 (2.0GHz), 4GB RAM, 320GB, 15.6", Windows 7 Home Premium);

— Portebla minikomputilo *Asus Mini Notebook Computer* (Intel Atom N270 Mobil CPU (1.6GHz), 1GB RAM, 160GB, 10.1", Windows XP Home).

### Kiel partopreni en la konkurso?

Kreu amuzan kaj interesan reklamon pri *lernu!*. Ĝi povas esti aŭ mallonga (ĝis 5 minutoj) filmeto, aŭ interesa foto, aŭ bele desegnita bildo. La plej bonajn laborojn ni poste uzos por reklamado de *lernu!*. Ĉar ni ŝatus uzi vian reklamon por reklamado al ne-esperantista publiko, ĝi prefere estu en la nacia lingvo kun apuda traduko al Esperanto (aŭ ĝi povas esti en Esperanto kun nacilingvaj subtitoloj aŭ traduko). La rezulton videbligu en la reto (vi povas uzi por tio diversajn ekzistantajn servojn, ekzemple: Facebook, flickr, YouTube ks.) kaj sendu la ligilon al via laboro retpoŝte al [konkurso@lernu.net](mailto:konkurso@lernu.net).

La konkurso daŭros ĝis la 31a de julio, 2011.

Fine ni planas aranĝi la voĉdonadon ĉe *lernu!* Unu gajnton elektos la vizitantoj de la paĝaro kaj la alian — la teamo de *lernu!*. Ni invitas vin ĉiujn partopreni en la konkurso kaj festi kune kun ni!

### Kontribuu al la plibonigo de lernu!

*lernu!* estas senpaga retpaĝo, sed la programado, ekipaĵoj kaj retspaco ne estas senkostaj. *lernu!* ne povus ekzisti sen la financa helpo de Esperantic Studies Foundation (ESF) kaj ankaŭ sen reklamado kaj sen agrablaj donacoj de la uzantoj. Se vi uzas *lernu!* kaj ĝuas ĝin, ni petas ke vi pripensu donaci al nia paĝaro. Detaloj troveblas ĉe:

[http://eo.lernu.net/pri\\_lernu/subteno/finance.php](http://eo.lernu.net/pri_lernu/subteno/finance.php)

*lernu!*-teamo



# Murdo de hundo

de Wolfgang Kirschstein

## Kopenhago dum la floranta epoko

Postrestas la palacoj de la nobeloj, eble la domoj de burĝoj, sed malaperis la kabanaj kie loĝis la “homoj el la keloj” plej malalte aŭ margene en la socio.

Dum la “floranta epoko” en Danlando, la 18a jarcento, la domoj en Kopenhago estis plejparte modernaj. Dum la granda incendio en 1728 forbrulis, pro la stulta sinteno de la fortikajestro, preskaŭ ĉiuj mezepokaj domoj. La urbo aspektis bele. Sed nur de malproksime. Ene, inter la urbaj remparoj, ĉies nazo spertis tuj, ke la urbo estas same fetoranta kiel ĉiu alia tiutempa urbo.

La kanaloj de la urbo estis plenaj de variaj substancoj, kadavroj de hundoj, katoj, ratoj — kaj homoj, kiuj pro akcidento aŭ krimo flosis en la malklara likvaĵo. Tiama gvidlibro eĉ preskribis, kiel oni povu certiĝi, ĉu la droninto vere estis morta — per blovo de tabakfumo en la anuson. La kuracarto provizis aparaton por tiu procedo.

Alia fonto de la ĉie reganta fetoro estis la malfermaj kloakoj ambaŭflanke de la stratoj. Foje ili estis tiom profundaj, ke infanoj dronis en ili. Kelkloke ili estis provizore kovritaj per bretoj. (Tiam ili povis kaŝi ne nur la kloakakvon, sed ankaŭ bebojn; tio okazis ekzemple en 1762 ĉe la placo de Sankta Anna). El la domoj oni ĵetis la enhavon de la noktovozoj en la kloakojn, la buĉistoj kaj aliaj nutraĵistoj kontribuis per siaj rubaĵoj, kaj kompreneble sian eblon faris ankaŭ dombestoj — bovinoj, porkoj, ĉevaloj. La nazoj de la 18a jarcento registris la fetoron kaj plendis pri ĝi, iliaj nazoj ne estis pli malsentemaj ol la niaj, sed ili estis kutimaj — vivi en la urbo implikis vivi en stinko.

La merdon forportis la “noktaj viroj”. Ili vivis kiel parioj en la socio. La bona socio traktis ilin kiel homojn sen honoro, ĉar ili faris tiun necesan, sed maldezirindan laboron.

## La murdo de la dorlotbesto

La 29an de septembro 1788 la ambasadoro de Portugalio, Dom Alexandre de Sousa, kun sia sepjara filo Pedro promenis tra Kopenhago. Ili estis inter la stratoj Knabrostræde kaj Badstuestræde. Ili promenis kun hundo, eble

Noktaj viroj en Kopenhago ĉe sia necesa, sed maldezirinda laboro



pudelo, kiun la ambasadoro donacis antaŭ ok jaroj al sia edzino. Ĝi estis dorlotbesto de la sinjorino kaj fidela ludkamarado de la eta Pedro.

La trankvilon rompis apero de tri ulaĉoj. Ili aspektis minacaj, krome ili estis armitaj per klaboroj. Ili estis Lorentz, Hans kaj Christian. Senplue Lorentz levis la klaboron — kaj frapis la hundon. La vundita besto kuris inter la piedojn de la mastro, kiu klopodis defendi ĝin kaj sin per sia senefika glaveto. Nenio helpis — Lorentz frapis denove, kaj la hundo iĝis morta. Feliĉe, advokato Kinch preterpasis kaj kondukis la ambasadoron kaj ties ŝokitan filon en iun butikon. Aliaj promenantoj atestis la spektaklon, sed neniu intervenis. Post la sukcesa murdo la tri uloj malaperis.

Hundoj estis tre popularaj en tiu tempo; la honorplenaj burĝoj promenis kun siaj dorlotataj bestoj. Eĉ la plebo dividis sian malriĉaĵon kun hundoj. Krome estis strathundaĉoj, kiuj vagadis tra la urbo, serĉante ion manĝeblan. Ili estis malpuraj, malicaj kaj, se ili estas mordemaj, ili povis transdoni la nekuraceblan rabion.

Kvin jarojn pli frue, en 1783, la kuracisto Johan Clemens Tode kampanjis kontraŭ strathundoj kaj fariĝis pro tio malpopulara ĉe la kopenhaganoj. Ili eĉ ĵetis stratkoton al li kaj ridindigis lin ĉiumaniere. Sed la kampanjo de Tode kulminis, kiam strathundo transdonis rabion al la junulo Michael. Tode priskribis en faka ĵurnalo la etapojn de la malsano kaj morto de tiu malfeliĉa junulo. Michael fariĝis eĉ fama pro tiu priskribo. Antaŭ lia morto la burĝaro de Kopenhago venis por algapi lin, la evoluon de lia malsano, kaj fine la morton de Michael. Lia tragedio estis la triumfo de Tode: la magistrato de la urbo komisiis al la “nokta majstro” kaj al ties helpantoj la ekstermadon de hundoj, kiuj kuris sen gvidanto tra la urbo.

Ni jam menciis, ke la “noktaj viroj” havis la saman statuson kiel karceruloj kun bruliga marko. Ne ĉiu burĝo ŝatis, ke tiuj uloj iris armitaj tra la stratoj. Ĉiu klopodis eviti kontakton kun ili, kaj pro tio neniu intervenis, kiam ili mortigis la hundeton de la ambasadoro.

## Dilemo de la poliestro

La antaŭa poliestro ordonis, ke la hundoj de evidente honestaj homoj estis escepte netuŝeblaj, sed la nuna forigis tiun klaŭzon kaj nun estis la problemo — kion fari? La ambasadoro plendis oficiale ĉe la ministro por eksterlandaj aferoj kaj postulis punon por la plenuminto de tiu aĉa ago. Lorentz, la oficisto de la “nokta majstro” argumentis, ke li nur faris sian laboron. Se li ne estus farinta sian laboron, la magistrato ja povus riproĉi lin. Lorentz eĉ denunciis la fremdulon ĉe la polico, ĉar tiu tiris sian glaveton kontraŭ plenumantan oficiston — ĉu tio ne similis al atako de fremda povo al Danlando?

La poliestro devis — vole nevole — pro premo de la ministro doni iun punon. Li konsideris ĉion kaj kondamnis Lorentz al unuhora piloriado. Lorentz ja protestis, sed nenio helpis. La 11an de novembro li devis toleri la mokon de stratbuboj, de la plebo kaj probable ankaŭ de ŝatantoj de hundoj.

Post kelka tempo la magistrato de Kopenhago decidis finfine sekvi la ekzemplon de aliaj urboj: oni kaptis la hundojn surstrate, sed mortigis ilin aliloke.



# Zamenhofa omaĝo al Schleyer

de Reinhard Haupenthal



Antverpeno: Spritaj kongresanoj maljungis la ĉevalon de la kaleŝo, en kiu veturis Zamenhof, kaj mem tiris ĝin kun la Majstro tra la kongresurbo (dankon al Roy McCoy pro la skanado de la malnova foto).

Lundo, la 21a de aŭgusto 1911: solena malfermo de la 15a Universala Kongreso de Esperanto en Antverpeno. Kiel jam de 1905 Zamenhof parolas kiel “tradicia malfermanto”. Post enkondukaj ĝentilaĵoj al reĝo Alberto (protektanto), al la urbestro kaj al la belgaj esperantistoj, li daŭrigis:

Mi uzas ankaŭ la okazon de nia festo, por revoki en vian memoron la nomon de unu viro, kiu havas grandegajn meritojn en nia afero. La prelado Johann Martin Schleyer, kies nomon ĉiu el vi konas tre bone, la aŭtoro de Volapük, antaŭ nelonge festis la okdekan datrevenon de sia naskiĝo, kaj estus nepardoninde, se ni ne uzus la okazon de nia nuna ĝenerala kunestado por esprimi al li tiujn sentojn, kiujn ni ĉiuj havas por li. Li estas la vera patro de la tuta internacilingva movado. Antaŭ li oni ankaŭ revis pri lingvo internacia, oni provis labori por ĝi, sed tio estis nur teoriaj skizoj, palaj senkorpaj fantomoj en la regiono de la revoj. Li estis la unua, kiu diris al si: por lingvo internacia mi volas ne revii, sed labori; dum ĉio ĉirkaŭe dormis, li estis la unua, kiu praktike kreis la internaci-lingvan *movadon*. Volapük ne estis venkita de Esperanto, kiel multaj personoj pensas tute erare; ĝi pereis *per si mem* en tiu tempo, kiam la trankvile kaj senartefike laboranta Esperanto estis ankoraŭ tro malforta, por iun venki. Ĝi pereis ne pro sia stranga sonado aŭ pro aliaj similaj kaŭzoj <...>. Mi proponas al vi, ke okaze de la festo de Schleyer ni telegrafe sendu al li, en la nomo de la tuta esperantistaro, nian koran gratulon, nian dankon por lia granda laboro kaj nian deziron, ke li vivu ankoraŭ longe kaj havu la konscion, ke la fruktoj de lia laboro neniam pereos.

## Komentario

1. Efektive Schleyer iĝis 80-jara je mardo, la 18an de julio 1911. Ĉi tagon li pasigis en sia hejmo konstanca laŭ jena tag-ordo: je la naŭa li celebris sanktan meson kaj preĝis por bona morto-horo. Li ricevis multajn poŝtaĵojn, vinojn, tortojn, florojn. Preskaŭ ĉiuj lokaj pastroj lin gratulis, ankaŭ la du urbestroj (Weber kaj Hanlik).

2. La analizoj de Zamenhof pri la perejo de Volapük nek lingvistike nek historie sufiĉas: li simpligas, kaj liaj klarigoj havas mito-krean karakteron. La perejo de Volapük akcelis tri faktoroj:

- ties lingvaj (mal)kvalitoj en komparo kun Esperanto (jen kial okazis transiroj de unu lingvo al la alia);
- la eraro de Schleyer kredi, ke lingvo estas kvazaŭ patentebla persona proprieto kaj ne socia afero;
- la rifuzo de oboe kaj reforma ondo kun ĉiam pli da lingvovariantoj dum la stadio de la krea interlingvistiko.

Gonçalo Neves en ĵusa studo *Zamenhof kaj Volapük* en la fest-libro *Instrui Dokumenti Organizati* por Claude Gacond montras, ke al la rilatoj de Zamenhof al Volapük kaj Schleyer mankis objektiveco...

3. La 24an de aŭgusto 1911 (ĵaŭdo) Johann Martin Schleyer notas tag-libre:

1911. 396.  
 22. 9-a de aŭg. m. i. m. (m. korn.); fersend. Aŭgust: 22.  
 tag. Finland...; 177. vortoj, rajngojn, zija  
 23. 9-a de aŭg. m. i. m. (m. korn.); fersend. 23.  
 Narrativus an Schlingenschen bei Bremer Fr.;  
 bei Joseph Künzler in Bremer Hof; vone in eigen  
 24. 9-a de aŭg. m. i. m. (m. korn.); fersend. 24.  
 Telegramm des Esperanto-Kongresses in Ant-!  
 wegen Erhalt, aber & beantwortet; vone in eigen.

“Ricevis telegramon de la Esperanto-kongreso en Antverpeno, sed ne respondis”. Evidente, la konkurenca entreprenon li plu ignoris, kvankam lia propra projekto jam falis en forgeson, kaj li mem iĝis legenda figuro.

En la jaro 2012 oni festos la 125-jaran ekziston de Esperanto kaj memoros pri la 100a morto-tago de Schleyer. Al ambaŭ eventoj Bavara Ŝtata Biblioteko en Munkeno, dediĉos ekspozicion kaj simpozion kies detalojn oni trovas ĉe: <http://www.bsb-muenchen.de/Einzeldarstellung.403+M5d573d27caa.0.html>

Ĉi-jare la redaktoro de *La Ondo de Esperanto* partoprenos nur en unu esperantista renkontiĝo:

**ARKONES**

Poznań (Pollando), 23–25 sep 2011

# Poemoj de Kozjma Prutkov



En la antaŭa paĝo de la *Rusa Antologio* (marto 2011) estis prezentita specimeno de la satira poezio de Aleksej Konstantinoviĉ Tolstoj. Li estas konata ankaŭ kiel ano de la kelkpersona poeta grupo, kiu verkis sub la masko de **Kozjmá Petróviĉ Prutkóv**.

Laŭ la legendo li naskiĝis la 11an de aprilo 1803 en vilaĝo proksima al la malnova norda Ruslanda urbo Soljvyĉegodsk. Post mallonga armea deĵoro kiel husaro, en 1823 Prutkov forlasis la armeon kaj eklaboris en la Etalona ĉambro (fako de la Financa ministerio pri mezurado kaj kontrolado de noblaj metaloj) kie li laboris kvardek jarojn kaj iĝis ĝia direktoro en la alta rango de efektiva ŝtata konsilisto. Li mortis la 13an de januaro 1863.

Nuntempe oni preskaŭ forgesis la dramojn kaj komediojn de Prutkov, sed plu legataj estas liaj aforismoj *Fruktoj de meditado*, fabloj kaj poemoj, verkitaj de Aleksej K. Tolstoj kaj de liaj kuzoj Aleksėj Miĥájloviĉ Ĵemĉŭjnikov (1821–1908), Aleksándr Miĥájloviĉ Ĵemĉŭjnikov (1826–1896), kaj Vladimír Miĥájloviĉ Ĵemĉŭjnikov (1830–1884).

Ĝis nun oni diskutas, kia tipo estis Prutkov: ĉu pompa rimplektanto, ĉu memironia blagulo, ĉu saĝulo sub la masko de banala malspritulo. Respondo mankas, ĉar la kunaŭtoroj mem ne havis unuecan imagon pri Prutkov, kaj tial ne ĉiam klaras, kiuloke la fikcia aŭtoro verkis parodiojn, imitis famulojn, aŭ verkis originalajn poemojn, laŭ sia ne ĉiam sama talento. Sed klaras, ke aforismoj kaj versoj de Kozjma Prutkov venis en la ĉiutagan rusan lingvon el literaturo same amase kiel citaĵoj el Ivan Krylov kaj Aleksandr Gribojedov. Kaj ili estos citataj, preskaŭ ĉiam sen penso pri la aŭtoreco, tiom longe, kiom oni parolos ruse en ĉi tiu mondo. **AIKO**

## LA PAŜTISTO, LA LAKTO KAJ LA LEGANTO

*fablo*

*Jen foje portis ien lakton la paŝtist',  
Sed je tioma fora dist',  
Ke li reveni jam ne povis.  
Leganto! Eble vi lin ie trovis?*

## KATERINO

*Quousque tandem, Catilina,  
abutere patientia nostra?*

Cicerono

*«Alta rang', orden' ĉe l' sino,  
kaj ne oldas mi laŭ jar'...  
Katerino! Katerino!»  
«Jen, jam pretas samovar'.»  
«Vera bildo, jen fascino!»  
«Ĉu sur muro? Kie do?»  
«Vi — la bildo, Katerino!»  
«Jes, en ord', ne dikas tro.»  
«Viro — mi, kaj vi — fraŭlino...»  
«Kion sekvos tio ĉi?»  
«Karban brulon, Katerino,  
En la brusto sentas mi!»  
«Te' varmegas — jen rutino.»  
«Sed amaras te', en ver'.  
Kial — diru, Katerino!»  
«Ĉu malmulte da suker'?»  
«Kvazaŭ mankas!» «Kun rafino,  
Estas tute bona spec'.»  
«Ho, amare, Katerino,  
Estas vivi sen edzec'!»  
«Vidvo, fraŭlo — sed en fino  
Tute mankas diferenc'!»  
«Vi obstinas, Katerino,  
Jam finiĝas pacienc'!»*

## JUNKRO ŜMIDT

*Velke pasas la somero.  
Prujn' argente helas...  
Junkro Ŝmidt el revolvero  
Sin mortpafi celas.  
Haltu, frenezul'! Ripete  
Verdo vivoplenos!  
Junkro Ŝmidt! Mi ĵuras vete —  
La somero venos!*

Tradukis el la rusa lingvo **Valentin Melnikov**

## Esperanto en Bydgoszcz

*Esperanto en Bydgoszcz pli ol 100 jaroj* / Redaktis Andrzej Grzębowski; Tradukis el la pola Regina Grzębowska. Bydgoszcz: Skonpres, 2010. — 24 p. — 3600 ekz.

Post la transloĝiĝo al Kaliningrado en 2001 mi ekserĉis informojn pri la Esperanto-movado en ĉi tiu urbo, kiu ĝis 1946 nomiĝis Kenigsbergo. La serĉado komenciĝis unue en la *Enciklopedio de Esperanto*, poste en malnovaj periodaĵoj (*Esperanto*, *Heroldo de Esperanto*, *Germana Esperantisto*). Mi rimarkis, ke Kenigsbergaj esperantistoj havis intensajn kontaktojn kun siaj kolegoj el Danzig, Allenstein, Marienburg, kaj kun tiuj el la urbo Bromberg, kiun mi ne tuj sukcesis identigi. Evidentiĝis, ke ĝi estas tre bone al mi konata Bydgoszcz, kiun mi regule vizitis en 1990aj jaroj — la urbo ĉe la rivero Brda, kies malnovajn grenmagazenojn oni kutime montras dum ekskursoj.

*Esperanto en Bydgoszcz pli ol 100 jaroj* estas 24-paĝa verketo, eldonita okaze de la 100a datreveno de la vizito de Zamenhof al la apuda kurac-loko Ciechocinek, kie kun li renkontiĝis esperantistoj de Bromberg, kaj de pli ol centjara Esperanto-agado en la urbo.

La tekstojn, kiujn esperantigis Regina Grzębowska, verkis kelkaj aŭtoroj. La unuan, plej ampleksan tekston *Esperanto-agado en Bydgoszcz — pli ol 100 jaroj* pretigis Andrzej Grzębowski, kompletigante, aktualigante kaj redaktante priajn laboraĵojn de Roman Wiktor Rutkowski kaj de Józef Paweł Bieliński. La urbo ĝis 1920 nomiĝis Bromberg kaj apartenis al la Pruslanda provinco Posen (nun Poznań). La unua esperantista societo en la urbo estis fondita en 1908. Ĝin prezidis germano Moritz Kandt, sindiko de la Komerca Ĉambro en Bromberg. Li estis tre aktiva en la landa movado en la jaroj 1908–1912: sekretario de la Germana Esperanto-Societo, komitatano de UEA, okupiĝanta pri komercaj aferoj. Li aktive partoprenis en la kongresaj diskutoj en Augsburg kaj Antverpeno. Kiam decembre 1908 en Kenigsbergo fondiĝis Orientgermana Esperanto-Ligo (Ogelo), el la tri centraj oficoj la Bromberga grupo ricevis tiun por informado kaj publikigado de informoj. Krome ĝi ricevis prezidantecon por la dujara periodo kaj d-ro Kandt prezidis kunvenojn de la delegitoj de Ogelo. En 1912 pro malsano li devis rezigni siajn postenojn, li mortis en 1918 nur 53-jara.

(Pri la kaŭzo de lia eksiĝo ekzistas ankaŭ alia versio.)

La prezento disvolviĝas kronologie. Sekvas priskribo de la Esperanto-agado post la Unua Mondmilito kaj la aligo de la urbo al Pollando. En 1919–1920 en la urbo aperis la ĵurnalo *German-Pola Esperantisto* kaj estis eldonita la germanlingva lernolibro de Esperanto de Arthur Pankratz “dediĉita al germanoj kaj poloj, por ke ili povu interkompreniĝi pere de neŭtrala lingvo”. La Pollanda parlamentano Arthur Pankratz en la kongreso de la Germana Socialdemokrata Partio en Pollando, okazinta en Bielsko en 1924, akceptigis rezolucion rekomendantan al la partianoj lernadon de Esperanto. En la sama periodo aktivis ankaŭ Leopold Kronenberg, poste profesia esperantisto, lingvoinstruisto.

Precipe aktiva estis la urba Esperanto-vivo komence de la 1930-aj jaroj, kiam fondiĝis pluraj societoj kaj rondoj, interalie en la klasika gimnazio, kie instruis la lingvon Mieczysław Sygnarski, aŭtoro de lernolibro. Ĉi tie aktivis la fratoj Edmund, Stefan kaj Jan Fethke, la lasta kun la pseŭdonimo Jean Forge monde konata literaturisto kaj reĝisoro. Por travivi la tiaman etoson oni relegu lian rakonton *Nia nigra filo*.

Post la Dua Mondmilito esperantistoj en Bydgoszcz disvolvis sian agadon en la kadro de la Pola Esperanto-asocio. Menciindas la publikigo de la 30-leciona kurso de esperanto en la dusemajna ĵurnalo *Fakty i Myśli* (Faktoj kaj Pensoj). Esperanto, kun kvar aliaj lingvoj, estis enkondukita al amasa

En la 1990aj jaroj mi ofte vizitis la sidejon de Monda Turismo en Bydgoszcz. (*HaGo*)



Kampanjo de Lernado de Fremdaj Lingvoj, kaj dum kelkaj jaroj okazadis Internaciaj Lingvaj Skoltaj Tendaroj apud Bydgoszcz; tiam la Esperantajn subtendarojn gvidis skoltmajstro Andrzej Grzębowski. La 1970-aj jaroj estas tempo de amasa intereso pri Esperanto, en Bydgoszcz estis la plej granda filio de PEA kun 6 mil membroj. Esperanto ekde 1976 ĉeestas en la ĉiujaraj Tagoj de Bydgoszcz, kadre de kiuj okazas Tutpollanda konkurso de Esperanto-poezio kaj kanto. Ekde 1990 la internacia organizaĵo *Monda Turismo* trovis sian hejmon en Bydgoszcz, kiu ĝis nun ĉiuseptembre gastigas la tradiciajn Internaciajn Foirojn de Esperanto-Turismo. Jam dudek jarojn funkcias Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo, kie la sola laborlingvo estas Esperanto.

La skizo de Grzębowski donas koheran bildon pri la historio de Esperanto en Bromberg-Bydgoszcz, kvankam mia intereso estas ne sufiĉe kontentigita. Volonte mi legus pli ampleksan studon, des pli, ke nuntempe oni povas kompletigi ĝin el diversaj fontoj. Ekzemple, ampleksa biografio de Mieczysław Sygnarski, iam publikigita en *Pola Esperantisto*, nun estas legebla en la retejo Edukado.net.

Fine de la libreto estas la listo de *Meritaj esperantistoj de la 20a jarcento en Pollando* — ial en ĝi mankas la Esperanto-pioniroj el la Pruslanda periodo, kvankam ĝuste Leopold Kronenberg estis la Esperanto-instruisto de Sygnarski; ankaŭ la fratoj Fethke ne ricevis eĉ etan biografian notajon. Makulas la tekston eraroj aŭ mistajpoj en la nomoj: Kant (devus esti Kandt) kaj Atrur anstataŭ Arthur (en la 2a paĝo).

Andrzej Grzębowski faris ankaŭ dupaĝan resumon pri *Rekono de Esperanto en turismo kaj edukado*. Apartaj artikoloj sciigas la biografiojn de Kazimierz Małycha kaj de Józef Paweł Bieliński. Pri la fervojista rondo rakontas Leszek Łęgodowski kaj pri la klubo de nevidantoj *Esperanta amiko* — ĝia fondintino Helena Skonieczka. Enestas utila listo de la nunaj aktivaj esperantistoj kun koncizaj prezentoj de iliaj aktivadoj.

Mi deziras, ke la libreto servu kiel la bazo por pli ampleksa kaj detala historio de la Esperanto-movado en Bromberg-Bydgoszcz, kun nepra aldono de la historia fono. Al kolektado de informoj oni povas altiri studentojn de ISTK kadre de iliaj fakaj studoj.

**Halina Gorecka**

## La eldon-aventuro de Stafeto

En la 600-paĝa libro *Rikolto* de Juan Régulo Pérez (1914–1993) kiun mi editoris kun mia amiko Gaston Waringhien (1901–1991) oni trovas du kontribuojn en kiuj Régulo mem parolas pri sia eldon-entrepreno: unu el 1957 (Babilo pri *Stafeto*), alia el 1984 (*Stafeto*: Homaranisma kultur-aventuro) kun kreskanta inklino mitokrea...

Priskribebblas ĝis nun nur la *ekstera* historio de *Stafeto*, t. e. la reale aperintaj libroj kaj eventualaj rememoroj de aŭtoroj kaj kunlaborantoj. La *internan* historion ni devas atendi ĝis alir eblos la arkivo de Régulo, se ankoraŭ ĝi ekzistas...

Vero estas, ke post la definitiva malapero de *Literatura Mondo* en 1949 (eldonejo kaj revuo), ekestis ia vakuo en la alt-nivela eldon-agado de Esperanto. La origina ideo de Régulo estis reeldoni en 1952 la *Sekretajn Sonetojn* de Peter Peneter (t. e. Kálmán Kalocsay), aperintajn en 1932. Ĉi taskon li plenumis 13 jarojn poste per *Libro de Amo* en kiu aldoniĝis la erotikajoj de Georgo Peterido Peneter (t. e. Gaston Waringhien): ĝi aperis anonime kun indiko 1969 (por omaĝi sesdeknaŭmadon) kaj “Sub la ŝild-anonco de l’ Akacio” (t. e. la kacio = lando de la kaco)...

Nu, ni restu ĉe la sobraj faktoj kiel ili registriĝis en mia libreto *La STAFETO-libroj* (Saarbrücken 1986). Laŭ tio, krom la menciita eksterseria *Libro de Amo*, Régulo eldonis jenajn seriojn:

1. “Bel-literatura eldon-serio” (ekde n-ro 18: “Belliteratura serio”) kun sume 41 numeroj (39 titoloj): la n-roj 13 kaj 34 neniam aperis;

2. “Beletraj Kajeroj” kun sume 48 numeroj (47 titoloj): la n-ro 47 ne aperis;

3. “Popularscienca eldon-serio” kun sume 5 titoloj;

4. “Movado” kun 10 numeroj (9 titoloj): la n-ro 6 ne aperis.

Entute 101 titoloj en kiuj enkalkuliĝas la eldonoj de Kehlet, kiu en la fino daŭrigis la seriojn. Pluraj verkoj estas kolektivaĵoj: la start-volumo *Kvaropo* (Auld, Dinwoodie, Francis, Rossetti), la *Esperanta Antologio*, la

novelaro *33 rakontoj*, *Japana Kvodlibeto*, la jugoslavia *Reeĥoj* kaj la -ata/-ita-volumo *La Zamenhofa Esperanto*.

La ceteron konsistigas bunta mikso el originalaĵoj (ankaŭ nefikciaj) kaj tradukoj. Ni renkontas, por ekzemplo, la jenajn nomojn: Hendrik Adamson, Jakob David Applebaum, William Auld, Gyula Baghy, Imre Baranyai, Louis Beaucaire, Douglas Philipps Boatman, Werner Bormann, Marjorie Boulton, Clelia Conterno Guglielminetti, Edwin de Kock, John Sharp Dinwoodie, Isaj Dratwer, Hilda Dresen, Stellan Engholm, Alberto Fernández, John Francis, Lina Gabrielli, Ivan St. Georgiev, Kahil Gibran, William Gilbert, Teo Jung, Kálmán Kalocsay, John W. Leslie, Alexander Logvin, Geraldo Mattos, Miyamoto Masao, Paul Neergaard, Roberto Passos Nogueira, Julia Pióro, Claude Piron, Bertrand Potts, Edmond Privat, Baldur Ragnarsson, Jean Ribillard, William F. Rolt, Reto Rossetti, Raymond Schwartz, Teodoro Švarc (Tivadar Soros), Sándor Szathmári, Ferenc Szilágyi, Lajos Tárkony, Leander Tell, Poul Thorsen, Stefo Urban, Eli Urbanová, Henri Vatré, Kjell Walraamoen, Gaston Waringhien, Eugen Wüster, Lazar Markoviĉ Zamenhof.

Inter la tradukintoj menciindas: Roger Bernard, Probal Dasgupta, Fernando de Diego, Douglas B. Gregor, E. A. Haugen, Kálmán Kalocsay, Leonard Nowell, Mansell Newell, Tomaš Pumpr, Baldur Ragnarsson, Reto Rossetti, Sergej Rublov, Roan Orloff Stone, Vladimír Váňa, Gaston Waringhien.

Jam en 1988 Régulo cedis la restintajn stokojn al UEA kiu plu provas disvendi ilin. Oni devas dubi, ĉu komerce la Stafetaĵoj estis ia sukceso: Régulo mem estis komercista nulo. La plimulto de la verkoj poste neniam



reaperis. Pri kelkaj oni devas tion bedaŭri, ekz. la Francis-romano *La granda kaldrono* kaj la *Esperantologiaj Studoj* de Wüster. Eble pleje sukcesis *Kiel akvo de l’ rivero* de Schwartz kun ties tri represoj (inkluzive de la pirata far Casini). En la lastaj jaroj *Maskerado ĉirkaŭ la morto* (Soros) ĝisvivis novan renesancon. Pri la valoro de iuj necesas duboj: iuj el la titoloj enseriigitaj jam de Kehlet, sed ankaŭ pri decidoj de Régulo mem: *La profeto* (Gibran/Stone), *Elingita glavo* Verdiro (Leslie), *Romeo, Julieta kaj la tenebro* (Otčenášek/Váňa, komplete lingve refarita de Régulo mem), *La bona ŝanco* (Bormann)... Unu ambicia projekto de Régulo ĝis nun ne realiĝis: nova, ĝisdatigita eldono de *Enciklopedio de Esperanto*, alian (la planitan trian volumon de *Leteroj de Zamenhof*) mi realigis ali-loke, kadre de la Zamenhof-verkaro prizorgita de Itô Kanzi. Frue Régulo antaŭvidis kiel numeron 13 de sia unua serio sian propran verkon *Rikolto*. Ĝin li neniam realigis, sed ĝi aperis en 1982 ĉe Gersi Alfredo Bays en Brazilo.

Régulo aparte fieris, ke nul titolo lia havis malpli ol 100 paĝoj: tamen, se ĉi kriterion oni absolutigus, granda parto de la Esperanta literaturo simple ne ekzistus... Kontraste al *Literatura Mondo* kiu komuniĝis kun siaj legantoj ankaŭ per elstara revuo, *Stafeto* neniam kreis ĉi servon. Inverse, revuoj kiel *Norda Prismo* kaj *la nica literatura revuo* neniam produktis libro-merkato. La budapeŝta ekzemplo restas ne ripetita ĝis hodiaŭ.

Al la verkota kompleta historio de *Stafeto* apartenas ankaŭ la grava ĉapitro de la recepcio, ekz. la eĥo en la sam-tempulaj recenzoj. Kompilante la recenzojn pri la ankoraŭ laŭdata (sed ĉu legata?) *La infana raso* de Auld (laŭ Schwartz komprenebla nur dank al la ilustraĵoj de Pablo Picasso), oni facile konstato, ke la sam-tempuloj tute ne unu-anime akklamis ĝin.

Se *Stafeto* estis la persona eldon-aventuro de Régulo (li vivis en izolo kaj dum longa tempo estis ia-speca klaĉo-centro de Esperantujo, kiun li ĉiam konsideris “opereta lando”), ĝi estas ankaŭ publika eldon-aventuro ĉirkaŭita de mitoj detruendaj de sobra literatur-historio.

Reinhard Haupenthal

## Kia vortordo en Esperanto?

Jansen, Wim. *Naturaj vortordoj en Esperanto*. — Rotterdam: UEA, 2008. — 40 p.

La libro de nederlanda esperantologo Wim Jansen *Naturaj vortordoj en Esperanto* estas resumo de lia scienca esploro, publikigita en la nederlanda lingvo en 2007. La Esperanta libro, iom simpligita por kompreno de scivola laiko, estas eldonita de UEA en 2008.

La ĉefa valoro de la libro en ĝia Esperanta traduko estas doni sciencan bazon al la logike evidenta maldezirindeco de banalaj prezentoj de Esperanto kiel, interalie, “lingvo kun libera vortordo” (aŭ foje eĉ “absolute libera vortordo”, ĉu?). Jansen montras preferon de certaj vortordoj (do, “naturaj vortordoj”) per studo de tekstokorpuso (jarkolektoj de la revuoj *Esperanto* kaj *Monato*) kaj aldone kontrolas la rezultojn per eksperimento: statistike prilaborita enketado de kvardek esperantistoj, profesiaj kaj ne, pri la vortordaj preferoj. La rezultoj, li diras, “montriĝis tre homogenaj”.

Tiel evidentiĝis, ke Esperanto estas SVO-lingvo (do, lingvo, en kiu la “natura” vortordo estas “Mi amas vin”) — 90% (!) de la frazoj en la studita korpuso sekvis ĉi tiun ordon. Jansen klarigas kun ekzemploj, kiel funkciaj emfazo de la frazeroj per permutoj.

Simile estas traktataj negacio, substantivaj grupoj, kunokazantaj rekta kaj nereka objektoj, manieraj kaj gradaj adjektoj.

Speciale mi ŝatus mencii la lingvaĵon de la libro mem — malgraŭ manko de kutimo legi Esperante pri sintakso kaj korpusaj esploroj, mi tamen facile povis legi la negrandan libron de Wim Jansen. La glosaro fine de la libro estas ankaŭ tre utila. Haveblas ankaŭ bibliografio, longa ĝuste tiel, ke ĝi ne iĝu fortimiga.

Malgraŭ tio, ke la antaŭparolo promesas, ke la libro povas esti “helpilo por instruistoj, kursestroj kaj verkistoj de lernolibroj”, por pluraj inter ili ĝi povas ŝajni tro teda aŭ momososa (modern-matematiksciencestila) — tamen pruntepreni la libron kaj tralegi ĝiajn du paĝojn, 35 kaj 36, ja utilos al ĉiu legipova esperantisto. En ĉi tiuj paĝoj estas la ĉapitro “Veroj kaj duonveroj pri la vortordo de Esperanto”.

Vjaĉeslav Ivanov

## Ricevitaj libroj

*Esperanto en Bydgoszcz pli ol 100 jaroj* / Redaktis Andrzej Grzębowski; Tradukis el la pola Regina Grzębowska. — Bydgoszcz: Skonpres, 2010. — 24 p. — 3600 ekz. — [Recenzoekzemplero].

Jansen, Wim. *Naturaj vortordoj en Esperanto*. — Rotterdam: UEA, 2008. 40 p. — [Recenzoekzemplero].

*Kantoj de milito* / Komp. Boris Zozulja; Tradukis el diversaj lingvoj Éva Farkas Tatár, Konstantin Gusev, Anastasija Ĵukova, Tivadar Kereszthegyí, Stefan Kiragiev, P. Rajkov, P. Stepanov, Miĥail Ŝĉerbinin, Boris Zozulja. — Rostov-na-Donu: Verda Kukolo, 2010. — 38 p. — [Donaco de Boris Zozulja].

*Studprogramoj de AIS pri turismo kaj kulturo en Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo (ISTK) — Klerigejo de AIS en Bydgoszcz (AKB)* / Kompilis Andrzej Grzębowski. — Bydgoszcz: Skonpres, 2010. — 32 p., il.; 3600 ekz. — [Donaco de ISTK].

Ŝĉerbinin, Miĥail. *Orgeno*: Elektitaj verkoj. — Rostov-na-Donu: Verda Kukolo, 2010. — 101 p. — [Donaco de Boris Zozulja].

Vidman, Čestmír. *Laskavá fantazie = Karesa fantazio*: [Dulingva poemaro] / Tradukis el la ĉeĥa Jaroslav Krolupper, Jiří Patera, Margit Turková. — Praha: Petr Dvořák, 2010. — 118 p., il.; 500 ekz. — [Donaco de Jiří Patera].

## Ricevitaj gazetoj

Esperanto Aktuell, 2011/2; Frateco, 2011/92; Ĝenerala Informilo, 2011/166; Heroldo de Esperanto, 2011/4; InKo, 2011/61; Internaciisto, 2011/2; La Lanterno Azia, 2011/4; La Movado, 2011/5; La Ondo de Esperanto, 2011/6; La Revuo Orienta, 2011/5; Monato, 2011/5, 6; Usona Esperantisto, 2011/2; Verda Saksofono, 2011/1.

## Kurucz adiaŭas Junan Amikon

ILEI devis kun bedaŭro sed komprenemo akcepti la deziron de la longtempa redaktoro de *Juna Amiko* Geza Kurucz retiri sin el tiu posteno fine de 2011. Geza estis la motoro en la ideo lanĉi tian revuon en Hungara Esperanto-Asocio, por plenumi evidentan bezonon por la multaj tiamaj lernantoj de Esperanto. Li kun kelkaj aliaj instruistoj povis vidi la similspecajn revuojn je dispono por la lernantoj de aliaj lingvoj, kaj komprenis la valoron aperigi ion similan en Esperanto. Feliĉe, li konvinkis ILEI-kaj HEA-estraranojn pri tio, kaj la revuo ekaperis.

Li redaktis la revuon regule de 1973 ĝis 1981, kaj kiam en 1996 la revuo denove bezonis redaktoron, Geza, precize en tiu jaro emeritiĝinta el lernejsstra posteno, reprenis la torĉon. Ekde tiu momento li denove sola ĉefredaktis la periodaĵon ĝis 2004, kaj de 2005 la duonon de la revuo, kiu tiam ricevis duoblan amplekson (52 p.).

En 2006 Geza estis elektita honora membro de ILEI. Nun 75-jara, li deziras liberigi sin de la peza devo trifoje jare lukti kontraŭ obstinaj limdatoj. *Juna Amiko* multe suferos pro tio — Geza inter ĉiuj redakcianoj estis ĉiam tiu, kiu orde kaj frue pretigis sian materialon, rigore respektante limdatojn. Ni ĝojas, ke Geza pretas plue kaj laŭokaze kontribui kaj helpi, ankaŭ en la enkondukado de novaj redaktoroj. Per aparta mesaĝo, ni alvokos por novuloj eniri la redakcian teamon, aŭ prizorgi difinitajn rubrikojn.

La tuta estraro de ILEI, kaj la redakcio kaj teamo de *Juna Amiko* kore dankas al Geza pro la multjara fidela servado!

Stefan MacGill  
Prezidanto de ILEI

**Monato**  
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

**Sendependa internacia  
revuo en Esperanto kun  
legantoj en 65 landoj!**

■ Politiko ■ Komputado ■ Scienco  
■ Moderna vivo ■ Hobio ■ Sporto

[www.monato.net](http://www.monato.net)

Flandra Esperanto-Ligo  
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen  
monato@fel.esperanto.be

Por la aprila *Sudoku* venis dek kvin respondoj, ĉiuj estas tute ĝustaj.

2	6	1	3	5	7	4	9	8
7	5	9	2	8	4	1	6	3
8	4	3	6	1	9	2	7	5
9	1	5	8	7	3	6	2	4
3	2	6	5	4	1	9	8	7
4	7	8	9	6	2	3	5	1
1	8	2	4	9	5	7	3	6
6	3	7	1	2	8	5	4	9
5	9	4	7	3	6	8	1	2

Ilin sendis: Anne George, Edmund Grimley Evans, Eric Smith (Britio), Marek Blahuš (Ĉeĥio), Erkki Kemppainen (Finnlando), Guy Tatet, Jacqueline Huberdeau (Francio), Rainer Haupt, Edeltraut Henning (Germanio), Alexander Mikišev (Israelo), Zbigniew Tylkowski, Hanna Skalska (Pollando), Svetlana Konjašova (Ruslando), Roland Larsson (Svedio), Julia Sigmond (Rumanio).

Loto donis la libropremion al **Eric Smith**, kiun ni varme gratulas.

Vidu la solvon ĉi-supre.

### Proverboj trovendaj 3

Por la tria fojo ni proponas tian taskon. Necesas solvi la enigmon de nekonata skribaĵo. En la sekva teksto kaŝiĝas du proverboj el la *Proverbaro Esperanta* de Zamenhof. Viajn respondojn bonvolu sendi tiel, ke ili venu al la redakcio antaŭ la 10a de septembro.

Nora Caragea

ζ ≈ ⊃ ∅ ≡ ÷ ≥ θ [ θ ⊆ φ θ ÷  
√ ⊆ ≈ ÷ ≈ θ ≠ ≡ ÷ ≥ θ .

≤ θ ⊆ ≠ θ θ ≠ ≤ θ ⊆ ≠ θ  
θ ≤ ⊃ ≠ θ ≠ ≠ ≡ √ ≈ ≤ θ ÷ .

### Klara Ilutoviĉ

*Al la jubileo de  
"La Ondo de Esperanto"*

*Plu verdas la gracia planto –  
Ne premu fuma rutin’  
"La Ondo de Esperanto" –  
Mi legas delonge ĝin.*

*Per kio viviga ondas  
La lingva maro sen fin’,  
"La Ondo" al mi rakontas –  
Mi nepre plu legos ĝin.*

*Vortriĉojn en loga kvanto  
Donacas la magazin’  
"La Ondo de Esperanto" –  
Mi legos dankeme ĝin.*

*Je sano kaj forto plenas  
La lingvaj pano kaj vin’.  
"La Ondo" kun ili venas –  
Mi legas kaj legos ĝin.*

## Spritaĵ splitoj kaj preskeraroj

*el la kolekto de reduktoro*

### Ne hieraŭ elkovitaj

Frank (...) aparte ĝuis la barlastonan somerlernejon kaj la kontakton kun malovaj amikoj... (Paul Gubbins. *Bona ideo... kiu dependas de vi // La Brita Esperantisto*, aŭtuno 2008)

### La ĝena realo, aŭ: Plena harmonio

Vi pensas precize kiel mi. Pri la unuopaj okazoj ni povas samopinii, sed ĝenreale ni konsentas. (Renato Corsetti, 14 jun 2011, [tech.groups.yahoo.com/group/revuloj/message/20027](http://tech.groups.yahoo.com/group/revuloj/message/20027))

### Chu la Ŝtona gasto?

En la 22a de majo, la Estraranoj kaj Konsilianoj de Japana Esperanto-Instituto... akceptis novan Statuon... (Sibayama Zyun’iti. *La estrara kunsido de JEI en majo*, 23 maj 2011, [groups.yahoo.com/group/landa-agado/message/15916](http://groups.yahoo.com/group/landa-agado/message/15916))

### El la kolekto de reduktoro: Reduktita reduktado

Bella Centro konscias pri la grava rolo de CO<sub>2</sub>-reduktado kaj decidis redukti ĝin je 20% ĝis 2010. ([96uk-kopenhago.dk/knap-Kongresejo.html](http://96uk-kopenhago.dk/knap-Kongresejo.html); rimarkis Kalle Kniivilä)

### Enkartuŝiginda titolo

De folkloro ĝojo ĝis opera kartuŝo (titolo de disko de Joanna Albrzykowska-Clifford, [katalogo.uea.org/grandaj/8257.jpg](http://katalogo.uea.org/grandaj/8257.jpg), rimarkis Ionel Onet)

### Komplete senkomente

En Esperantio la reto... liveras nur informojn, kaj ne alispecajn rubrikajn. (*Kial "Heroldo" reala en la epoko virtuala?* HeKo 476 7-B, 10 apr 2011, [esperantio.net/index.php?id=1663](http://esperantio.net/index.php?id=1663))

### Pliaj halucinoj kaj revelacioj

... kio estas la misio de UEA en la nuna mondo? Kia vizio kuŝas malantaŭ ĝi...? Kaj kiuj estas la ĉefaj agadkampoj, sur kiuj ĝi provu realigi tiun vizion? (Raporto de la Komisiono pri Strategiaj Demandoj, 11 apr 2011, [groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/6468](http://groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/6468))

### Timigaj UK-anoj restos hejme

... probable estas kunrilato inter UEA-aneco kaj ĉeestado al Universalaj Kongresoj, kaj pro tio oni povas timi malpli da kongresanoj en Danio kaj en Vjetnamio. (Dennis Keefe. *Nuna membro-krizo, posta financo-krizo?* 9 apr 2011, [liberafolio.org/2011/drasta-membrofalo-ce-uea#1302309956](http://liberafolio.org/2011/drasta-membrofalo-ce-uea#1302309956))

### Amasmortado en 1975, aŭ: la false falĉa jaro

Franco mortis antaŭ 36 jaroj. Same kiel Pablo Iglesias kaj Marx kaj Stalin. (Augusto Casquero, 17 feb 2011, [es.groups.yahoo.com/group/iberia-esperantistaro](http://es.groups.yahoo.com/group/iberia-esperantistaro); rimarkis Kalle Kniivilä)

Plukis István Ertl

**Agrablan someran sezonon  
al ĉiuj aŭtoroj kaj legantoj**

*deziras "La Ondo de Esperanto"*

# ARKONES XXVII



**ARTaj KONfrontoj en Esperanto**  
**Poznań, 23-25 septembro 2011**  
*Kun aŭspicioj de TEJO*

iam kompletigota plena verkaro de I. I. Zamenhof  
*Nova postrikolto finfine aperis!*



iam kompletigota  
plena verkaro de I. I. Zamenhof

1. la preparado de la bulonja kongreso
2. Carlo Bourlet kaj la revuo
3. 1917, forpasis nia majstro
4. dumilitaj esperoj

nove elfosita 4 dokumentoj, kompilitaj de  
Ludovikito por pliampleksi PVZ

Libroteko Tokio

**900 paĝoj en kvar kolektoj en unu disko.**  
**Kolektis kaj kompostis Ludovikito.**  
**Eldonis Libroteko Tokio.**  
**Prezo de la tuto: nur 12 eŭroj.**  
**Mendebila ĉe UEA, JEI kaj KLEG.**




**Kostariko.** Kadre de sia longa instruvojaĝo tra la Latina Ameriko, la 23-jara belgino Anneleen Nys vizitis plurajn landojn. En Kostariko ŝi havis la okazon partopreni kurson de Guido Hernández, kiu dum multaj jaroj instruas Esperanton al studentoj de la Teknologia Instituto de Kostariko. (*ameriko.org*)



**Esperanta Civito.** La 3an de junio en Milano la Esperanta Civito, reprezentata de la Konsulo Giorgio Silfer, kaj la Kabinda Respubliko, reprezentata de la Kanceliero Joël Batila, agnoskis reciproke unu la alian. Tio estas la unua agnosko de la Esperanta Civito kiel subjekto de internacia juro. (*Fotis Holevich*)




**Nederlando.** Oficistoj de la Centra Oficejo de UEA la 29an de majo aranĝis informtablon ĉe la festivalo *Dunya* ("mondo" en la turka lingvo), kiu komencas serion de someraj festivaloj en Roterdamo. Inter ĉ. 200 mil vizitantoj de la festivalo, pluraj ricevis informojn ĉe la Esperanto-stando (*F. L. Veuthey*)



Aleksander Korĵenkov. *Zamenhof*  
 Serio *Scio*, Volumo 9  
 64 paĝoj, 6 eŭroj



Arthur Conan Doyle. *La ĉashundo de la Baskerviloj*  
 Serio *Mondliteraturo*, Volumo 6  
 168 paĝoj, 15 eŭroj



*Dek libroj* / Kompilis Aleksander Korĵenkov  
 Serio *Nia Trezoro*, Volumo 1  
 32 paĝoj, 4,50 eŭroj



*Dek gazetoj* / Kompilis Aleksander Korĵenkov  
 Serio *Nia Trezoro*, Volumo 2  
 32 paĝoj, 4,50 eŭroj